

2000–2599 paŝoj – 12 baladoj

& Garantio:	530
& Hetmano:	534
& La morto de Jánošík:	539
& Nepunebla krimo:	545
& Car' Nikita kaj kvardek liaj filinoj:.....	549
& La postena dometo:.....	554
& Kanto pri Modrý Kameň, Divín kaj Zvolen:.....	558
& Sigmunda balado pli nova:	563
& La agloj de Tatroj:	568
& Drako Longa:.....	574
& Jalgrima balado:.....	581
& Kanto pri du hungariaj sinjoroj kaj la filino de l' turka imperiestro: ..	588

& Garantio:

< Rekante 52 el 101 batoj por strofo, entute 2020 paŝoj dum 23 minutoj. Verkis? Schiller. El germana? tradukis? Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵoj.>

(#Melodio:

<1,5:101> (

/So o La LaTi do dodo Ti TiSo LaLa; dodo TiTi La a;Ti do dore mi mimi re reTi LaLa; dodo TiTi La a;Ti %R do dore mi mimi re reTi SoSo; dodo TiTi La a;So La LaTi do dodo Ti TiSo LaLa; dodo TiTi La a;Ti %S do dore mi mimi re reTi LaLa; dodo TiTi La a;Ti do dore mi mimi re reTi SoSo; dodo TiTi La a;Ti do domi %T so somi re reTi SoSo; dodo TiTi La a;Ti do domi so somi re reTi SoSo; dodo TiTi La a;So La LaTi do dodo Ti TiSo LaLa; dodo TiTi La a)×20)+

(&Strofoj:

< El Ŝiler.>

'1 /Damon' unu fojon mallaŭte trairis (×: **&P;** **Pasas tempo jam** ;) Kun akra tranĉilo sub bask' al tirano – (×: **&P**) Al %R Dionisio, – sed unu gardano (×: **&P**) Lin kaptis subite. Tiran' al li diris: (×: **&P**) "Pro %S kio al mi vi, bastardo, aliris?" (×: **&P**) – Mi sanktan promeson ekvolis plenumi... – (×: **&P**) "Krimulo! mi %T tuj vin ordonos krucumi!" (×: **&P** **Je vorto vi kredu, pro morto ne cedu. &P** Elportos amiko se sorto vin pikos. **&P**)

'2 – Jam longe al morto mi estas pretita, Kaj, kredu, ne diros mi eĉ unu vorton Pro mia pardono, ĉar havas mi forton, Por morti sur kruco; sed se inklinita Vi estas al bono, – ho, estu donita Al mi kelka tempo, por fraton edzigi, – Ĉe vi – do mi povas amikon restigi. –

'3 Kruele ekbrilis tirana rigardo, Kaj jen li eldiris post kelka silento: "Tre bone, kun tio mi estas konsenta; Sed bone vi tamen memoru, bastardo, Ke vian amikon mi tenos sub gardo Ne pli, ol tri tagojn, – kaj poste li mortos, Al vi li per tio pardonon alportos."
.....

'4 Al sia amiko Damono alvenis Kaj diris: "tiran' min aljuĝis krucumi, Ĉar volis mi sanktan promeson plenumi. Kaj mi nur tri tagojn ricevi elpenis Por fraton edzigi." Kaj li ĉirkaŭprenis Amikon kaj petas: "Ho, restu, karulo, Vi por garantio ĉe malbonegulo!"
.....

'5 Amiko volonte konsentis, kaj restis En malliberejo li por garantio, Kaj tuj liberigis Damonon per tio. Damono edziĝon de frato forfestis, En tria mateno tre frue sin vestis Kaj vojon rapidas, malfrui timante Kaj ĉiam pri sia amiko pensante.
.....

'6 Subite tre forta ventego fariĝis, Kaj tondro, kaj fulmo, kaj granda pluvego; Pli forte, pli brue koleras ventego, – Kaj jen riveretoj de mont' ekruliĝis, Riveron plenigis, kaj ĝi ekondiĝis. Damono al ponto rapidas de monto, – Kaj vidas, ke estas rompita jam ponto.
.....

'7 Li vagas sub pluvo sur bord' de rivero, Kaj tre malproksime li vidas dometon; Li krias, li vokas, li petas ŝipeton, sed vane, – neniu ĉar kun malespero Ekvolas batali kun brua rivero. Kaj baldaŭ rivero jam aliformiĝis: Je maro ĝi larĝa simila fariĝis
.....

'8 Kaj jen lian koron plenigis doloro – Li ploras, antaŭen li manojn etendas, Kaj preĝon varmegan al Zeŭso li sendas: "Kompatu! – li petas kun granda fervoro – kaj min ekrigardu kun dia favoro! Se al Sirakuzoj vi min ne alportos, Ho! mia amiko senkulpe ja mortos!"
.....

'9 Sed vane kompaton de
Zeŭso li petas: ventego,
kaj ondoj, kaj pluv' ne ĉesiĝas,
..... Sed ĉiam pli fortaj, teruraj
fariĝas, – Kaj tempo
forpasas. Damono formetas
..... De si sian veston, kuraĝe
sin ĵetas En bruon riveron
kaj naĝas, tranĉante Per
brusto nur ondon, kun mort'
batalante.

'10 Kaj jen li jam estas sur
bordo, – elŝiris Sin mem li
el brakoj teruraj de morto,
Kaj multe dankem' al favoro
de sorto Rapidas li plu.
Sed subite eliris El granda
arbaro rabistoj. Aliris Al
ili Damono, – kaj ili malpace
..... Ĉirkaŭis lin tute, rigardas
minace.

'11 "Ho, kion vi volas,
krimuloj? – li diris –
Ankoraŭ ne scias, friponoj, vi
tion, Ke, krom ŝarĝa vivo,
mi havas nenion, – Sed
vivo ne estas jam mia!" Li iris
..... Al ili, de unu bastonon
elŝiris, Per ĝi li elsvingis,
kaj tri formortigis, Aliajn –
do ĉiujn facile forigis.

'12 Sed suno post pluvo
varmege bruligis
Migranton, kaj tute li perdis
jam forton, Kun granda
teruro atendis li morton, –
Kaj preĝis li Zeŭson: "vi min
liberigis El ondoj bruegaj,
de mi vi forigis rabistojn,
– ĉu tie-ĉi devas suferi Mi
vane kaj morti, amikon
oferi?!"

'13 Kaj – kio-do? – ŝajnas al
li, murmuretas Ne tre
malproksime malgranda
rivero: Rapide sin turnas al
ĝi kun espero Damono –
kaj vidas, ke fonto fluetas.
Al ĝi superforte li tuje
vaĝetas, Soifon brulegan
kun ĝoj' kvietigas kaj
korpon malsanan en ĝi
refreŝigas.

'14 Jam suno varmege majeste
subiras Kaj ombroj
longegaj kuŝiĝas sur tero:
Tre baldaŭ jam venos
trankvila vespero. Sur vojo
al urb' du migrantoj jen iras,
..... Damono – do ilin sur voj'
preteriras. Migrantoj
parolas, Damono aŭskultas
Kaj aŭdas: "nun lin oni jam
ekzekutas!"

'15 Tumulto piedojn al li
flugiligas, – En lia animo
– senfinaj teruroj. Kaj jen
Sirakuzoj! Nur suprojn de
turoj Malalta jam suno
facile origas: Jam estas
vespero! Kaj li rapidigas
Ankoraŭ pli paŝojn, – kaj
vidas – en strato
Renkontas lin lia servant'
Filostrato.

'16 – Revenu, ĉar ĉio jam
estas finita! Li diris
malgaje: – en urbon ne iru,
Mi petas vin, el Sirakuzoj
foriru! Li estas jam al
ekzekuto metita. Li kredis
ĝis fin', ke li estos trompita
Neniam de sia amik', kaj nenio
..... Lin povis devigi ne kredi
je tio. –

'17 "Ho, se jam malfrui al mi
estas sorto, Kaj se mi ne
povas de mort' liberigi
Amikon, mi devas min ankaŭ
mortigi: Tirano ne diru, ke
kuris de morto Mi nur
dank' al mia anima malforto!
..... Al vi mian vivon volonte
mi cedas, Sed sciu, ke
homoj kaj amas, kaj kredas!"
.....

'18 Vespere Damon'
Sirakuzojn eniras Kaj
vidas, ke kruco sur placo jam
staras, Kaj oni jam tute
amikon preparas, Por lin
ekzekuti. Kun forto traŝiras
..... Amason popolan Damono
kaj diras: "Mi morton
deziris de Dionisio, – Mi
estas krimulo, li – nur
garantio!"

'19 En granda mirego popol'
silentiĝas. En ĝojo amikoj
tuj sin ĉirkaŭprenas, Kaj
ploras, – pri kio – neniu
komprenas, Sed larmoj el
ĉiuj okuloj ruliĝas. Minaca
tirano pri ĉio sciiĝas; Li je
amikeco tiela tre miras Kaj
verajn amikojn li vidi deziras.
.....

'20 Kaj jen ili venas. Kun vido
afabla Tirano renkontas
amikojn kaj diras: "Vi tute
min venkis, senfine mi miras!
..... Mi estas ankoraŭ por amo
kapabla, Permesu al mi, ke
en ligo mi via, Amikoj
varmegaj, por vi estu tria!"
)

& Hetmano:

< Rekante 21 el 43 batoj por strofo, entute 2101 paŝoj dum 24 minutoj. Verkis Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:43> (/mimi miimimi mimi fafa faafafa fafa; mimi miimimi re dore mimi; mimi miimimi mimi fafa faafafa fafa; mimi miimimi re dore mimi;

(#Rekantaĵe: mi mimi mimi fa fafa fafa ; mimi reedore mi mi; mi mimi mimi fa fafa fa;fa mimi doTi La La a;

)×49)

+

(&Strofoj:

< suĵeto estas pruntita.
Poemo.>

'1 En senviva arbaro vivas
brava anaro ; Da rabistoj kun
sia hetmano. ; Li, ankoraŭ
junulo, estas glora bravulo ;
Kaj jam tenas potencon en
mano.

(×: **Kreskas arbar'**,
**groteskaj misfaroj ; kovras
sin de la suno. ; Brutaj
bandanoj, trupa hetman' ;
manovras for de puno.**)

'2 Ĉiuj multe lin timas, lian
saĝon estimas, ; lian vivon
zorgeme pririgardas, Li – do
estas severa, malkontenta,
kolera, ; Kaj rabistojn fiere
rigardas.

'3 En pasinta somero li kun
muta kolero ; Patran domon
forlasis por ĉiam, ; Kredi
veron li ĉesis, sanktan Dion
forĝesis, ; kaj rabisto fariĝis
de tiam.

'4 Li el mondo forkuris kaj
solene li ĵuris ; Senkompate
forvenĝi homaron, ; Kaj kun
tiu-ĉi ĵuro kruelega, terura, ;
Li forisis senvivan arbaron.
.....

'5 En arbaro sur fundo de
kavego profunda ; Lin okaze
raqbistoj renkontis: ;
Forkurinto mizera kun konfido
sincera ; Sian sorton al ili
rakontis.

'6 Lin rabistoj komprenis kaj tuj mem lin alprenis, ; kiel membron de bando ilia, ; Sed tre baldaŭ bandano mem fariĝis hetmano, ; Komandanto de aro malpia.

.....

'7 Li, kruela, kuraĝa, kvazaŭ besto sovaĝa, ; Al pasantoj kuradis renkonte, ; Kaj, kaptante oferon, ĝin ĵetadis sur teron ; Senkompate, senkore, senhonte.

'8 Eĉ rabistoj malvarmaj iafoje kun larmoj ; Kruelecon hetmanan rigardis ; Sed, ĉe vido de brilo sur lakita tranĉilo, ; Ion diri al estro sin gardis.

'9 Foje unu bandano pri senkulpa infano ; Senkompatan hetmanon ekpetis, ; Sed per propra lin mano tuj mortigis hetmano ; Kaj al hundoj por manĝo forĵetis.

'10 Lin jam serĉis polico, kaj kun lerta malico. ; Grandan monon promesis al tiu, ; Kiu vivan lin trovos, aŭ mortigi nur povos, ; Sed lin trovis, mortigis neniun.

'11 Longe vagis sen baroj en senvivaj arbaroj ; Nekaptebla hetmano kuraĝa, ; Kaj mokeme nur ridis, kiam aŭdis aŭ vidis, ; Ke lin serĉas polico sensaĝa.

'12 Unu fojon lin trovis kaj mortigi eĉ provis ; Du tro lertaj, kuraĝaj soldatoj, ; Sed hetman' ilin ligis kaj kun si veturigis ; En tendaron de siaj kunfratoj.

'13 Malfeliĉaj kaptitoj estis forte vergitaj ; De hetmano en densa arbaro, ; Kaj post tiam bandanoj kun katenoj sur manoj ; Ilin sendis kun rid' al estraro.

'14 Kaj estraro kolera en indigno sincera ; Nepre kapti krimulon intencis ; Kun decido tiela kontraŭ bando ribela ; Ĝi regulan militon komencis.

'15 Kaj subite arbaro, ĉirkaŭita per baro ; El soldatoj tre bone armitaj, ; Estis tute simila je grandega kaptilo ; Kun bestegoj en ĝi enŝlositaj.

'16 Al rabistoj kaptitaj venis spertaj senditoj ; Kun propono de plena pardono, ; Se nur ili sen vorto humiliĝos al sorto ; Kaj hetmanon fordonos pro mono.

'17 – Nu, amikoj-kunfratoj,
nin ĉirkaŭis soldatoj ; Diris
brava hetmano fiera: ; –
Humiliĝu al sorto, ĉar minacas
vin morto, – ; Mi ĝin diras el
koro sincera!

'18 – Mi konsilas vin cedi, ĉar
ne povas mi kredi, ; Ke vi
estas kapablaj al grando. ;
Ekrigardu, kunfratoj: en
arbaro soldatoj ; Nin ĉirkaŭis
de rando ĝis rando.

'19 – Vin soldatoj mortigos, aŭ
po unu kunligos ; Kaj eltrenos
el via arbaro, ; Sed se vi nur
deziros, vi liberaj eliros ; Kaj
kun mono el tiu-ĉi baro.

'20 – Nu, malpiaj bandanoj,
jen al vi miaj manoj ;
Senarmitaj kaj jam
sendanĝeraj: ; Ligu ilin sen
timo, kaj kun gaja animo ; Iru
for el arbaro liberaj!

'21 Lin respondis neniu, – sed
en brusto de ĉiou ; Frapis koro
per sento kolera. ; – Vi obstine
silentas? Ĉi kun mi vi
konsentas? – ; Diris ree
hetmano fiera

'22 Kaj tuj mem sonis krio:
"nin devigos nenio ; De
hetmano foriri perfide! ; Ni
hetmanon estimas, ni
danĝeron ne timas! ; Ni
batalon deziras avide!"

'23 Kaj senditoj kaptitaj estis
tuj disŝiritaj ; De rabistoj kun
krio sovaĝa. ; Tiam juna
hetmano kun tranĉilo en mano
; Proksimiĝis al bando kuraĝa.
.....

'24 Jen li ĉapon formetis, ĝin
sur teron li ĵetis ; Kaj per
brusto ondanta enspiris: ;
Kajmemfide, kun vido de
kuraĝa decido, ; Al rabistoj
solene li diris:

'25 – Venis tempo fatala de
kruela batalo: ; Ni atendas aŭ
venkon, aŭ morton, ; Nin
danĝero minacas, kaj al vi mi
donacas ; Mian kapon, kaj
koron, kaj forton!

'26 – Sed mi kredas, kolegoj,
ke eĉ grandaj nubegoj ; Da
soldatoj kun trafaj pafiloj ;
Nun disflugos por ĉiam kaj
batalos neniam ; Kontraŭ niaj
brilantaj tranĉiloj!

'27 Kun konfido anima kaj
kun ĝojo senlima ; Lin salutis
rabistoj – kunfratoj: ; "Vivu
estr' estiminda! Vivu frato
aminda! ; Forpereu malnoblaj
soldatoj!"

'28 Kaj en nokto senstela tuta
bando ribela ; Sian neston
malluman forlasas. ; Rampas
ventre klunfratoj, kaj simile je
katoj ; Ili mute, senbrue
trapasas.

'29 Jen ekpafo trasonis, bando
tuj ĝin ekkonis: ; Por komenco
ĝi estis signalo. ; Kaj rabistoj
atakas: pafas, tranĉas kaj
hakas. ; Komenciĝis kruela
batalo!

'30 Kiel iaj demonoj saltas
lertaj friponoj, ; Eksvingante
per akraj tranĉiloj. ; Kaj
batalon bruantan, homan
sangon fluantan ; Kaŝas nokto
sub nigraj flugiloj.

'31 En mateno – do frua estis
ĉio senbrua, ; hele suno suriris
brilanta. ; Sed ĝi sangon
ekvidis, kaj foriri rapidis ; Sin
kovrinte per nuboj fluganta.
.....

'32 Kaj en tuta ĉielo tuj fariĝis
ribelo: ; Fulmotondro eksonis
kolere, ; Nigraj nuboj ekbruis
kaj pluvego ekfluis, ; Pri
mortintoj plorante sincere.

'33 Kaj per larmoj naturaj
homaj agoj teruraj ; Estas iom
post iom lavataj. ; Nur sur
loko fatala, kie estis batalo, ;
Restos longe skeletoj soldataj.
.....

'34 Multaj jaroj forpasis. Jam
hetmano forlasis ; Sian
bandon kaj sian metion. ; Li
senfine sopiris, en dezerton
foriris, ; Kaj en ĝi rememoris
li Dion.

'35 Lia vivo sencela,
malprudenta, ribela ;
Elpentiĝis en lia memoro: ;
Ĉiam vivis li krima kun
malpura animo, ; Sen espero,
sen kredo en koro.

'36 Nun malpia krimulo jam
ne estas junulo, – Baldaŭ
venos jam morto severa, ;
Poste – juĝo de Dio. Lin
pravigis nenio, ; Ĉar ne kredis
li, vermo fiero!

'37 En senlima sopiro lin
vizitis deziro ; Formortigi sin
mem, kiel hundon. ; Kun
decido tiela en animo ribela ;
Li eniris kavegon profundan.
.....

'38 Lia mano tremanta kun
tranĉilo brilanta, ; Jam sin
levis al gorgo sulkita. ; Unu
movo de mano – kaj por brava
hetmano ; Estus ĉio por ĉiam
finita!

'39 Sed subite formetis li
tranĉilon kaj ĵetis ; Ĝin rapide
kun forto sur teron: ; Li
eksentis kun ĝojo je unua nur
fojo ; En mizera animo
esperon.

'40 Li de ĝojo ekploris, ĉar li
tuj rememoris, ; Ke li povas
formorti kun gloro: ; Lia vivo
rompita estas alte taksita ; De
estraro per multo da oro.

'41 Li ekĝemis facile, al ĉielo humile ; Siajn manojn li pie etendis, ; Kaj kun kredo kreskanta al Potenca Juĝanto ; Sian preĝon unuan li sendis.

.....

'42 Tiu preĝo sincera por hetmano fiero ; Estis ĝusta saniga balsamo: ; Nun, anstataŭ sopiro, lin vizitis deziro ; De reveno al bono, al amo.

'43 Kaj terura rabisto al malriĉa botisto ; Venas nokte kun stranga propono: ; "Vi fortike min ligu kaj en urbon venigu, ; Kaj ricevos vi multe da mono."

'44 Malriĉulo ekmiris: "ĉu ne estas, li diris, ; Vi freneza, amiko amata?!" ; – Ne, mi estas en sano, – sed mi estas hetmano ; De rabistoj, krimulo sciata.

'45 Jen en mezo de placo, kiel morta minaco ; Por senkoraj scivolaj vidantoj, ; Staras alta Pendingo, ĉirkaŭita per ringo ; De senmovaj policaj gardantoj.

'46 Kaj subite murmuro de nevola teruro ; Sonis brue en popolamaso: ; Sur pendinga subnmeto kun feliĉa rideto ; Maljunulo aperis malgrasa.

.....

'47 Jen per mano tremanta kun kateno sonanta ; Sanktan signon de kruco li faris, ; Kaj kun vido trankvila en vizaĝo humila ; Sin al morto kruela preparis.

'48 Oni donis signalon. Kaj en maŝon fatalan ; Estas kapo grizghara metita. ; Kelkaj movoj malfortaj, konvulsioj postmortaj, ; Kaj spektaklo jam estas finita!

'49 El bluaĝo ĉiela lumas suno tre hela ; Per radioj varmegaj brilantaj. ; Ĉio estas silenta, ĉio estas kontenta, ; Kaj senbrue disiras vidantoj.)

& La morto de Jánošík:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 2225 paŝoj dum 25 minutoj. Verkis Ján Botto. El slovaka tradukis Pavel Rosa (Slovaka antologio, 1977). Baladigis Martin Strid per novaj melodio kaj rekantaĵo, disdivido na strofoj kaj kunmeto na du poemoj.>

(#Melodio:

<1,5:25> (

/LaLa LaLa LaLa Tido TiLa SoSo; TiTi TiTi TiTi TiTi doTi
LaLa;

(#Rekantaĵe: La LaLa LaLa Tido TiLa So; do dodo dodo TiLa
SoLa La a)

)×89)+

(&Strofoj:

,& Unua kanto:

,& Parto unua:

'1 Flagras fajro, flagras, sur la
Mont' de l' Reĝo. ; Kiu ĝin
bruligis? - Viroj ekster leĝo.

(×: **Ombas malhele, suno
estas for, ; Tondras ribele en
la arda nia kor'.**)

'2 Viroj ekster leĝo, dek du
falkoj blankaj, ; por okuloj
homaj perfekte senmankaj.

'3 Dek du falkoj noblaj, falkoj
de la Tatro, ; kvazaŭ naskigitaj
nur de unu patro:

'4 banis en la lakto ilin panjo
sola, ; vindis ilin ame per
vindaĵo ora.

'5 Jen junuloj kvazaŭ kandel'
sur altaro; kiam ili iras, brilas
la arbaro.

'6 Ĉemizetoj verdaj,
arĝentborderitaj, ; ĉapeletoj
brilaj, aĝle ornamitaj;

'7 karaben', hakilo kaj pistola
duo: ; jen junuloj bravaj, mia
sola ĝuo! -

'8 Kiam ili fajron sur montaro
faras, ; dek du en distriktoj
blanka tag' ekstaras.

'9 Kiam la junuloj "de l' tero"-
n dancartas, ; dek du en
distriktoj ĉies kor' eksaltas.

'10 Kaj kiam sabreto super
kap' fajreras, ; koroj de l'
nobeloj pro timo ekstremas!

„& Parto dua:

'11 Montoj, grizaj montoj -
veraj hejmaj kortoj, ; nudaj
montoj vasta - veraj kampoj
gastaj -

'12 kaj sur Kriváň-monto
kastel' alta tronas ; kaj niajn
bravulojn libereco kronas.

'13 Kapitan' ilia - vera
grandsinjoro! ; Blanka
plumornamo, sur mantelo oro;
.....

'14 iras li en bosko - matenruĝ'
ekbrilas, ; tuta mondo tremas,
se li montojn iras!

'15 De Danub' al Tatro homoj
flustre plendas: ; Prenu,
sinjor', pagon, finkalkul'
atendas!

'16 Prenu, lupu, vi ĝin pagos
per la felo, ; jam tranĉiloj dek
du fulmas al la celo.

'17 Eksaltos dek viroj: -
"Halt'! Mil tondrobatojn! ; L'
animon al Dio kaj al ni
dukatojn!"

'18 Super kapo sabro, sur
brusto pistolo: ; "Pagu por
slovakaj sangkaloj, sinjoro!"
.....

„& Parto tria:

'19 De Danub' al Tatro kantas
orfoj kanton: ; "Helpu, Dio,
helpu nian defendanton!

'20 Helpu vi lin, helpu, en
sama mezuro, ; kiel li mezuras
al ni kun plezuro:

'21 mezuras per ĉapo dukatojn
dum la tago, ; ruĝan anglan
ŝtofon de l' fago al fago."

„& Parto kvara:

'22 Sur monto, sur roko brilas
blanka stelo, ; kliniĝu kabano
kaj ttremu kastelo!

'23 Ĉar kiun Jánošík sur
sabreto havos, ; tiun eĉ tri
reĝoj de l' morto ne savos;

'24 kaj al kiu flugos tripinta
letero, ; al tiu ne helpos muroj
ĝis ĉielo.

'25 Li foje ekfajfos - dek du
pafoj fajros: ; li denove fajfos
- mil bravuloj ardos!

'26 Post la tria fajfo tintos en
batalo ; sabroj de l' herooj en
Váh- kaj Hron-valo.

'27 Kaj per unu voĉo sonos ter'
kaj astroj: ; "En ĉi hejmo nia
ni ja estas mastroj!"

„& Parto kvina:

'28 Flagras fajro, flagras - jam
ne tiel forte - ; ĉirkaŭ fajro
sidas viroj dek senvorte.

'29 Sidas ili, sidas, fajron
enrigardas - ; senvorte
observas, kiel fajro ardas.

'30 Nur se bosk' ekmuĝas,
ŝanĝas sin vetero - ; ili ĝem-
eksaltas: "Ve, nia espero!"

'31 Janĉjo, Janĉjo kara, vi
suneto bela! ; Venu al ni,
venu, kiel tag' ĉiela!

'32 Tagiĝu, tagiĝu, mateno
alvenu, ; ke l' suno kolora per
varmo nin benu!"

'33 Fajro jam finbrulas, kiel
oferbruloj - ; ĉirkaŭ ĝi dek
viroj kiel sanktfiguroj,

'34 sidas ili, sidas, fajron
enrigardas - ; senvorte
observas, kiel fajro ardas.

'35 Flamet' ĝi jam estas - nur
eta rebrilo ; tremetas samkiel
zur tombo lampiro;

'36 eĉ tiun flameton estingas
jam vento, ; ekregas mallumo,
tombeja silento.

'37 Subite ekviĉas ia forto
mita: ; "Bonnokton, herooj!
Jánošík kaptita!"

„& Parto sesa:

'38 Ekmuĝis arbaro, valoj ne
postrestis - ; ekkantis dek
viroj: "Estis tempoj, estis!

'39 Estis tempoj, estis, sed jam
pasis ili, ; post mallonga
tempo eĉ ni devos iri!

'40 Kaj se ni forpasos, pasos
for la lando, ; kvazaŭ
derompiĝus rosmarena rando,
.....

'41 kaj se ni forpasos, pasos
mondo glora, ; kvazaŭ
derompiĝus rozo ruĝeflora.!
.....

,& Dua kanto:

,,& Parto sepa:

'42 Falas roso, falas, dum
mateno helas, ; eta knab'
ploranta ŝafojn hejmen pelas.
.....

'43 Suben, ŝafoj, suben, suben
tra la valo, ; Jánošík vin ne plu
ŝirmos kontraŭ falo!

'44 (Janĉjon vian karan oni
jam arestis! ;)×

'45 Kaptis lin jam kiel birdon
en kaptilon, ; lian oni fermis
en la kel' hakilon,

'46 kaj lin ĉirkaŭigis de kvar
mondoflankoj ; kiel korvoj
nigraj noblan blankan falkon.
.....

,,& Parto oka:

'47 Ĉe la tablo trinkas Jánošík
vineton - ; ĉirkaŭ li panduroj
plektas kapto-reton.

'48 (Jánošík, bravulo, ĉirkaŭen
rigardu: ;)×

'49 Mar-multegas ili, kaj vi
sola tamen ; "Jánošík, rezignu,
venis via amen!"

'50 Eĉ se de tri mondoj venus
vi, vandaloj, ; vi atingus al li
nur ĝis la kalkanoj;

'51 eĉ se vi faladus kielpluv' el
nubo, ; vi atingus al li nur ĝis
fingrosubo!

'52 Ĉe pordo hakiloj, pistol' en
fenestro: ; "Ho, vi jam ne
fuĝos, bela rapist-estro!"

'53 Se vi eĉ per kugloj lin
tempeste trafos: ; ne pretiĝis
kuglo, kiu lin mortpafos.

'54 Se vi lin tranĉhakos kiel
stumpan lignon, ; ĉemizeto lia
ne montros sang-signon!

'55 Jánošík ankoraŭ
trinkasmalrapide - ; panduroj
tra pordo atakas avide:

'56 "Kaptu lin!" - Ho, kiu!
Gajdošík perfidis? ; Perfidulo,
mortu - kaj mi al vi fidis!

'57 Tablopecon rompas li per
mano forta, ; frapas, kaj
Gajdošík falas teren morta.

'58 Janĉjo ĉe la tablo atendas
silente, ; oni lin atakas sovaĝe,
torente!

,,& Parto naŭa:

'59 "Ne timu, panduroj,
kuraĝe ataku: ; milas ni, li
solas - tute lin dishaku!"

'60 - Tiel do? Nu, bone! - li
jam vidas celon: ; Kiom da vi
venas en duonbuŝelon?!

'61 Unu manon dekstren, duan malen puŝas, ; kaj panduroj morte kiel ligno kuŝas.

'62 Janĉjo nia kara estus jam libera, ; se lin ne observus demonin' infera.

'63 Sed el niĉo forna krias ino morna: ; "Pizojn sub lin ŝutu, sentime kondutu!"

'64 Sub piedojn cervajn pizojn ŝutis oni: ; tuj katenojn sur lin oni povis doni.

'65 Sed apenaŭ Janĉjo kelkajn movojn faras, ; tuj katenoj de li kiel ŝelo falas.

„& Parto deka:

'66 Mil diojn, pradiojn!
Jánoŝík ekkriis - ; vi kanajloj, manĝu, kion vi kuiris!

'67 Li nur foje manon lerte ĉirkaŭsvingas, ; tuj de sep panduroj vivon li estingas;

'68 li per klabo ronde frapas venk-espere, ; kiel gren' falĉita ĉio kuŝas tere. -

'69 LOni hakis, pafis en lin same vane, ; kvazaŭ en granitan rokon infanmane.

'70 Janĉjo nia kara estus jam libera, ; se lin ne onservus demonin' infera.

'71 Sed el niĉo forna krias ino morna: ; "Haku lian zonon, tuj li perdos povon!"

'72 Sabroj cent subite fulme lin batpremismis, ; cent pafiloj tondre kuglojn sur lin semis;

'73 sed la sabroj, kugloj ĉe li sorĉe haltis ; kaj sur la murdistojn ili reen saltis.

'74 Unu nur sabreto, kiu renvershakis, ; la tendencon sorĉan en zonum' trahakis.

'75 "Ho, vi min jam trafis, venis horo sorta!" ; Janĉjo jam fariĝis kiel knab' malforta,

'76 la piedojn, manojn, oni jam katenis. ; Ke vin, fiulino, diabloj ne prenis!

'77 Jánoŝík, kapitan', vi tulipa floro, ; ne plu estos sur vi la mantel' kun oro,

'78 eĉ ĉemizon verdan oni de vi prenos; ve! en turmentojn oni vin fortrenos.

'79 Per tranĉiloj, fajro, oni vin turmentos: ; nur turmentu, batu, vi ja baldaŭ pentos!

„& Parto dekunua:

'80 Janĉjo, vi rabisto, vi infano bela! ; Oni vin turmentos pro rabad' kruela!

'81 "Rabis mi ja, rabis, luktis
por la vero, ; nigran
tiransangon sorbis herba tero;
.....

'82 jarojn sep somere rabis mi,
vin batis: ; kiel longe vi nin
ĝis nun ekspluatis?!"

'83 Janĉjo brava, vi ja multan
oron havas, ; diru al ni, kie? -
"Kial tio gravas?

'84 En sekretaj haloj Tatraj mi
ĝin tenas, ; trovos vi ĝin, se ĝi
al vi apartenas.

'85 Mia ĝi ne estis - vi ĝin ne
ricevos - ; nur li, kiu sabron
por la vero levos!"

„& Parto dekdua:

'86 Jánošík, vi havas trezoron
fabelan: ; elaĉetu vian vivon
junan, belan!

'87 "Elaĉeti vivon, kiun vi
subhakis? ; Ne! - nun vi minj
manĝu, se vi min jam bakis!"
.....

„& Parto dektria:

'88 Suben ŝafoj, suben, suben
tra la valo, ; Jánošík vin ne plu
ŝirmos kontraŭ falo;

'89 kaproj, for de roko, sur kiu
vi staris, ; oni jam por Janĉjo
kolrubandon faris.)

& Nepunebla krimo:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 2255 paŝoj dum 25 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:41> (

/dodo TiTi doTi La So; dore mido fare so so; dodo TiTi doTi La So; fafa mimi fami re do;

(#Rekantaĵe: so soso la ala mi faso fa a; mimi mimi fami re do; so soso la ala mi faso fa a)

)×55)+

(&Strofoj:

'1 /La belega Riviero ; Ĉe la golfo de Ĝenovo ; Estas paradiza tero ; Sub zefira ventoblovo.

(×: **Kiel do ni seniĝu je li? ; Estas granda li krimulo ; Kiel do ni seniĝu je li?**)

'2 Kaj en tiu ĉi edeno, ; Bela pli ol la imago, ; Bela pli ol florigardeno, ; Estas la landet' Monako.

'3 Jen landeto pli malgranda ; Ol distrikt' en la provinco, ; Tamen estas ĝin reganta ; Efektiva vera princo.

'4 Kaj ĝi havas registaron, ; Ĉefministron, konsilantojn, ; Kaj ĝi havas soldataron, ; Generalon, leŭtenantojn.

'5 Kaj ĝi havas eĉ policon, ; Ludobankon, direktoron; Kaj ĝi havas punjusticon: ; Juĝistaron, prokuroron.

'6 Bonaj estas ĉiuj homoj; Ne necesas puna ago, ; Ne necesas punodomoj ; En la princlandet' Monako.

'7 Tiel estis dum jardekoj, ; Oni tion jam kutimis; Ne okazis grandaj pekoj, ; Oni krimon ne plu timis.

'8 Jen okazis sed subite, ; Ke mortigis do fripono ; La najbaron plenavide, ; Ĉar delogis lin la mono.

'9 Oni kaptis la friponon ; Kaj lin donis al senato, ; Kiu havis la ordonon, ; Juĝi tuj lin sen kompatato.

'10 Do meditis ekscitite ; Oni pri eblec' konvena, ; Por lin puni laŭmerite ; Pro la krimo abomena.

'11 Oni do similan ion ; Serĉis en librar' kronika. ; Oni trovis sed nenion: ; Murdo estis krim' unika!

'12 Fine sed laŭ franca moro ; Do kondamnis la senato ; La krimulon kun fervoro Al la morto sen kompatato.

'13 Sed – jen mankis gilotino! ; Pro la senkrimec' senĉwesa ; estis senkapig-maŝino ; Ja ĝis nun ne jam necesa.

'14 Kaj pro unu nur fripono ; Oni novan ne aĉetis; Kostus multe ĝi da mono, ; kiun oni ne posedis.

'15 Kaj do oni trovi provis ; Nun alian mortigilon, ; Kaj post longa peno trovis ; Oni taŭgan do konsilon:

'16 Oni skribis tuj leteron ; Al la franca registaro ; Kaj rakontis la aferon ; Al potencia la najbaro.

'17 Oni petis pruntedonon ; De malnova gilotino; Senkapigu la friponon ; Franca majstro kun rutino.

'18 Kaj post kelkaj tagoj venis ; El Pariz' respondletero: ; Oni tie ja komprenis ; La gravecon de l' afero,

'19 Oni skribis: "Tre volonte ; Ni ja pruntus gilotinson, ; Kaj ekzekutist' Belmonte ; Akompanus la maŝinon.

'20 Kaj la kapon de l' fripono ; Tre volonte li dehakus, ; Se vi por la pruntedono ; Dudek kvinmil frankojn pagus."

'21 Tondro! Kian altan prezon ; Do sciigas la postulo! ; Tian altan monelspezon ; Ne meritas la krimulo!

'22 Kaj post longa diskutado ; Pri afero la fatala, ; Nun sin turnis la senato ; Al la registar' itala.

'23 Tie reĝo ja regadas; Eble lia politiko ; Princnajbaron do pli ŝatas, ; Ol la franca respubliko.

'24 Venis post semajnduono ; Jam respondleter' el Romo: ; "Pruntedonas laŭ bezono ; Ni maŝinon por ĉi-homo.

'25 Kaj ekzekutist' Herero ;
Tuj plenumus viajn dirojn, ;
Kaj jen kostus la afero ;
Dudek mil italajn lirojn."

'26 Pli modera jen postulo! ;
Tamen sed tro alta prezo! ;
Inda estas la krimulo ; ne al tia
monelspezo.

'27 Ĉu ne povus policano ; Do
plenumi la ordonon ; Kaj per
glavo en la mano ; Senkapigi
la friponon?

'28 Do demandis la senato ; La
polican direkcion ; Kaj
soldaton post soldato, ; Ĉu ne
iu farus tion.

'29 Ĉiujn tio sed konsternis, ;
Ĉiu sen hezit' deklaris: ; Tion
mi neniam lernis, ; Tion mi
neniam faris."

'30 Sed ĉu oni do pardonu ;
Tute simple la friponon? ;
Kian punon oni donu, ; Ne
havante ja la monon?

'31 Do kondamnis la senato ;
La krimulon kun saĝeco ; Kaj
laŭŝajne pro kompato ; Al
dumviva kaptiteco.

'32 Sed ĉar mankis punodomo
; Pro ĝisnuna nebezono, ;
Devis gardi forta homo, ; Ke
ne fuĝu la fripono.

'33 Sed jam post kvarona jaro
; Ne plu plaĉis tiu stato; Laŭ
ordon' de l' registaro ;
Rekunvenis la senato.

'34 Certe vivos la fripono ; Ja
ankoraŭ kvardek jarojn; Kiom
kostos li da mono! ; Ni evitu
la malŝparojn!

'35 Jen la konsiliĝa temo! ;
Kion oni devas fari ; En fatala
la dilemo, ; Ĉar ja oni volas
ŝpari?

'36 Tre cerbumis la senato ;
Pri gravega la demando, ; Kaj
post longa diskutado ; Do
proponis konsilanto:

'37 "Se l' gardiston ni
forprenos, ; Se ni lasos la
friponon, ; Li rapide
forpromenos, ; Kaj ni ŝparos
do la monon!"

'38 Multe plaĉis la propono. ;
Laŭ ordono de l' senato ; Do
foriris de l' fripono ; Nun
gardanta la soldato.

'39 La krimul' sed ne atentis, ;
Ke l' gardisto jam foriris; Sed
malsaton li jam sentis ; Kaj
tagmanĝon li deziris.

'40 Ĉar neniu plu alvenis ; Por
manĝigi la kaptiton, ; Li la
ujon mem ekprenis, ; Faris
kuirej-viziton.

'41 Kiam li manĝinta estis, ;
Li reiris sen hezito; En la
ĉambro plu li restis, ; Ĉar li
estis ja kaptito.

'42 Li ne pensis pri forkuro, ;
Ne deziris li liberon; La senat'
kun malplezuro ; Sed rigardis
la aferon.

'43 Oni tion ne komprenis;
Registara konsilanto ; Post tri
tagoj al li venis ; Kun malkaŝa
la demando:

'44 "Kial vi ne forpromenas? ;
Kial vi ĉi tie restas? ; Vin
neniu plu retenas ; Kaj vi
plenlibera estas."

'45 ased resonis la respondo: ;
"Per kondamna via juĝo ; Vi
ŝarĝegis min per honto, ; Kaj
ne restas plu rifuĝo.

'46 Kien iru mi, sinjoro? ;
Kion faru mi estonte? ; Ĉiu ja
kun malfavoro ; Persekutos
min senhonte.

'47 Vi ja kaŭzis la turmentojn ;
Per kondamna juĝo via, ; Do
vi donu alimentojn ; Por
estonta vivo mia!"

'48 Jen do la malnova stato! ;
Jen do sama la dilemo! ; Kaj
diskutis la senato ; Ree pri ĉi
tiu temo.

'49 Por almenaŭ ŝpari ion, ;
Por ke restu pli da mono, ; Oni
donis eĉ pension ; Al senhonta
la fripono.

'50 Por ke restu li punito, ; Oni
sed en sama tago ; Lin forpelis
sen hezito ; El la princoland'
Monako.

'51 Tio sed lin ne ĉagrenis, ;
Ne li sentis ian timon: ; En
Francujon li promenis, ; Sed
nur iom trans la limon.

'52 Tie domon li aĉetis; Ĉiam
en la dua tago ; de l' monato li
iretis ; En ĉefurbon de
Monako.

'53 Kaj li prenis la pension, ;
Kaj li moke "dankon" diris;
Dezirante ne plu ion, ; Trans
la limon li reiris.

'54 Kaj li dum duonjarcento ;
Vivis per monaka mono, ; Per
krimula daŭra rento, ; Pli
bonstate ol barono.

'55 Ho krimuloj, ĉu vi iras ;
En ĉifonoj, ĉu en frako, ; Se
pension vi deziras, ; Vi
formigru al Monako!)

& Car' Nikita kaj kvardek liaj filinoj:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 2294 paŝoj dum 23 minutoj, aŭ rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 1922 paŝoj dum 19 minutoj. "Fabelon por plenkreskuloj" verkis Aleksandr Puŝkin. El rusa tradukis Valentin Melnikov (La Ondo de Esperanto, 1999:6, p. 14–15). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por &Konfeso kaj modifita rekantaĵo. Alternative eblas uzi tiujn de &"Al la semanto". Klarigo (*): '22 Bojaro estas malnova rusa nobela rango.>

(#Melodio:

((# Konfeso: <1,7:37> /dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi milre; dore doTi LaLa LalSo (#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a))

?

(# Al la semanto: <1,7:31> /(domi somi remi fami; remi fare fami dodo;)× (#Rekantaĵe: LaLado miso somi remi; fami reremi fami domi; TiTire dore doTi LaSo LaLa La a))

)×62)+

(&Strofoj:

'1 /Vivis iam car' Nikita – ;
gaja, riĉa, dorlotita, ; sen
klopodoj pri rega2d', ; do
prosperis lia ŝta2t'.

(×: (& Konfeso: **Zorgojn li foje forgesas ; Li pri kreo ne sukcesas ; kaj malĝojon venkos li ; Jen kio nin interesas.**)

?

(& Al la semanto: **Do paŝu fiere en la ĉeno ; Manoj kune en firma teno ; Aŭdi rakonton de la klara voĉo jen.**))

'2 Agis car' poiomete, ;
manĝis, trinkis, kaj kviete ;
kun diversaj li patrinoj ; kreis
opon da filinoj:

'3 kvardek junulinoj belaj, ;
bonkondute puranĝelaj, ; ravaj
korpe kaj anime. ; Kiaj
gamboj – ho, sublime!

'4 Nigraj haroj – sen riproĉ', ;
la okuloj, ĉarma voĉ', ; brila
saĝo, belstaturetoj... ; Do, de l'
kapo ĝis la kruroj

'5 ĉio logis kaj majestis; sola
aĵo nur forestis. ; Kio estis do
mankanta? ; Vere, bagatelo
vanta.

'6 Tre malgranda detaler', ;
tamen – mankis sen esper'. ;
Kiel tion do klarigi, ; por ne
tute kolerigi

'7 stultulinon nian pian, ; la
cenzuron prude fian? ; Kiel...
Helpu Dio nure! ; Caridinoj
interkrure...

'8 Ne, tro klare tiel estus ; kaj
danĝere malmolestus, ; do
aliel, laŭ prefer': ; Belas
mamoj de Vener',

'9 lipoj, gamboj – por adoro, ;
sed fajrujo de amoro, ;
dezirata mia cel'... ; Kio
estas?... Bagatel'!...

'10 Tre malgranda detalero, ;
sed ja – mankis sen espero ; al
la caridinoj etaj, ; petolemaj,
vigli pretaj.

'11 Tre konsternis onin tio. ;
Tristis cara familio. ;
Vartistina klaĉ-parol' ; baldaŭ
trafis al popol'.

'12 Eksciinte tion, certe, ; ĉiu
gapis buŝ-aperte, ; veis, miris
aŭ ne fidis, ; kaj alia, eĉ se
ridis,

'13 do mallaŭte voĉis tion, ;
por eviti Siberion. ; Foje laŭ
alvok' de l' caro ; kolektiĝis
servistaro.

'14 Jene sonis la ordon': ; «Se
okaze pri malbon' ; la filinojn
vi sciigos, ; aŭ pripensi nur
instigos,

'15 aŭ aludos opinion, ; ke
malhavas ili ion; diros ion
dubasence, ; aŭ figestos
senintence, –

'16 do – sen ŝerc' – neglekte
rangon ; al virinoj tranĉi
langon, ; sed al viroj – eĉ pli
grave, ; kio povas iĝi mave».
.....

'17 (Car' severis, sed
prudentis. ; La ordono
elokventis;)×

'18 Ĉiu klinis sin kun trem', ;
pro la tim' kaj obeem', ; kaj
atente, sindetene ; la havaĵon
gardis pene.

'19 La edzinoj sentis timon, ;
ke ne faru l' edzoj krimon;
Pensis edzoj en sekret': ;
«Kulpu, kara edzinet'!»

'20 (eble, krudis laŭnature). ;
Caridinoj jam mature ;
kreskis. Caro pro l' kompat' ;
konsilion de la ŝtat'

'21 vokis; diris li sekrete ; la
problemon, kaj diskrete, ; kaŝe
de servista greg' ; ekmeditis la
korteg':

'22 kion fari por riparo ; de la
ĝena korpdefekt'. ; Kaj subite
jen bojaro*, ; sin klininte pro
respekt',

'23 (kalvan frunton pugni ekis,
; al la caro tiel blekis:)×

'24 «Moŝta car'! Pro l'
interven' ; volu lasi min
senpuna, ; se pri l' karna
abomen' ; diros mi. En aĝo
juna

'25 Pri l' parigistin' mi aŭdis ;
(Kion nun ŝi faras? Ĉu – ; –
plej probable – same plu). ;
Tiam multaj ŝin tre laŭdis:

'26 onidire – sorĉistin'. ; Ĉiajn
morbojn ŝi kuracis, ; korpajn
fortojn redonacis. ; Eble indas
trovi ŝin.

'27 (Sorĉistino helpi pretos, ;
la mankaĵojn tuj enmetos.)×
.....

'28 – «Urĝe ŝin retrovi penu! –
; tiel diras car' Nikita ; kun
mieno sulkigita: ; – Ke ŝi
helpu. Kaj se ne – nu,

'29 se ŝi trompos nin fripone, ;
ne akiros laŭbezone, ; se
intence, en arog' ; nin ofendos
per mensog' –

'30 – estu mi ne car', sed
hundo, ; se mi dum la Pura
Lundo ; ne kondamnos ŝin je
brul' ; por la glor' de l'
Eternul'.»

'31 Jen tra tuta lando slava ;
por plenum' de l' tasko grava ;
ĉien rajdas en sekret' ; kurieroj
laŭ dekret'.

'32 La ĉevalojn ili pelas, ;
sorĉistinon trovi celas. ; Pasas
jaro, pasas du – ; la novaĵoj
mankas plu.

'33 En arbaro, en malhel' ;
(diablo gvidis lin al cel') ;
vidas li: domet' arbara, ; loĝas
sorĉistin' grizhara.

'34 (Estis cara li sendit', ; do
envenis sen hezit'.)×

'35 klinsalute ŝin aliris, ; la
aferon caran diris: ; pri la
caridinoj lindaj ; kaj la mankoj
bedaŭrindaj.

'36 Sorĉistin' komprenis bone,
; pelis lin desurperone, ; diris
tiel: «Iru for, ; sen rigardi
mian neston,

'37 aŭ vi tuj ricevos peston... ;
Post tri tagoj – venu por ; havi
jam la pretan keston, ; tamen
nepre – ĉe l' aŭror'.»

'38 Ŝi enfermis sin por sorĉo, ;
provizinte sin per torĉo, ; dum
tri tagoj sorĉis, ritis, ; do
demono ŝin vizitis.

'39 Por plenumi caran volon, ;
mem alportis li skatolon, ;
plenan de la peka var', ; Kiun
ŝatas la virar':

'40 Tre diversaj laŭ grandeco,
; laŭ koloroj – ĉia speco, ;
(luksaj, buklas la harar'...)×
.....

'41 Ilin sorĉistin' inspektis, ; la
kvardekon elselektis, ; tuken
volvis la provizon ; kaj
enŝlosis en valizon;

'42 kun ĝi sendis kurieron, ;
por la vojo eĉ moneron ;
donis. Rajdas li sen ĝen'... ;
Ekripozas je maten',

'43 manĝas panon kun viando,
; plezurigas sin per brando: ;
Al la car' li bone servis, ; ĉion
por la voj' rezervis.

'44 La ĉeval' sin paŝtas. Revas
; la bravul' – ke l' car' lin
levas, ; nomas grafo plej
solene... ; Kio do troviĝas
ene?

'45 Kion sorĉistino sendas? – ;
pensas nia kurier'. ;
Rigardindas la mister', ; sed
valizo ja senfendas.

'46 Kaptas lin la scivolemo, ;
tiel ke obsedas tremo. ; La
orelo ĉe l' serur' ; ne perceptas
ion. Nur

'47 tra l' kovrilo la odoron ;
sentas nazo kuriera... ;
Damne! Jen miraklo vera! ;
Ŝatus fari li esploron.

'48 (Kurieron venkis tent'... ;
Li malfermis – post
moment')×

'49 la birdetoj – flug! – elane, ;
kaj eksidis sur la branĉ'. ;
Logas ilin li per manĝ', ;
disŝutante – tute vane:

'50 Panon ili ne bezonas ; (ja
alias la konsum'): ; sur la
branĉoj kanti bonas – ; kial
sidi en mallum'?

'51 Jen sur pad' sin trenas peze
; kun bastono oldulin' – ;
kurba nazo, ĝiba spin'. ;
Genuiĝis li kompleze:

'52 («Avineto, savu min! ;)×
Helpu per konsil' aŭ ag'! ;
Vidu, trafis kia plag':

'53 Kapti ilin mankas povo, ;
Kion fari por retrovo?» ;
Oldulin' rigardis sor, ; kraĉis,
siblis en rankor':

'54 «Aĉas via scivolem', ; sed
ne ploru senutile... ; Vi nur
montru – kaj facile ; tuj
alflugos ili mem.»

'55 «Dankon!» – diris li
tutkore, ; montris – kaj
birdetoj tuj ; lin alflugis
plenefavore ; kaj lokiĝis ĉe la
uj'.

'56 Ke ne estu plu minac', ;
senprokraste kaj singarde ; li
enŝlosis ĉiujn kvardek ; kaj
rapidis al palac'.

'57 La princinoj ilin prenis ;
kaj en kaĝoj zorge tenis. ; Pro
triumfo de l' reven' ; tuj okazis
la festen':

'58 oni dum semajn' festenis, ;
dum monat' – ripozo plenis;
konsilion sian car' ;
rekompencis sen avar',

'59 ankaŭ sorĉistinon same: ;
al ŝi sendis el muze' ; grandan
stumpon enbalzame ; (tiun,
konsternigan tre),

'60 (plus du bufoj kaj skeleto ;
el la sama kabineto...)×

'61 Ĉiuj kun la caro festis, ;
ĉiuj kun donacoj restis. ; Same
ankaŭ kurier' – ; Jen la fino de
l' afer'.

'62 Multaj damnas min kolere
; kaj demandus nun severe: ;
Kial stultas ŝerca dir'? ; Tute
simple! Laŭ dezir'...

& La postena dometo:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 2296 paŝoj dum 25 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Nepunebla krimo.>

(#Melodio:

<1,5:41> (

/dodo TiTi doTi La So; dore mido fare so so; dodo TiTi doTi La So; fafa mimi fami re do;

(#Rekantaĵe: so soso la ala mi faso fa a; mimi mimi fami re do; so soso la ala mi faso fa a)

)×56)+

(&Strofoj:

'1 /Kamparano Sagopiro ; En la vilaĝeto Ĉernis ; Estis tre naiva viro ; Kaj saĝecon li ne lernis.

(×: **Kiel do ni seniĝu je li? ; Estas granda li stultulo ; Kiel do ni seniĝu je li?**)

'2 Iam estis li husaro. ; Li parolis kun fervoro ; Poste ofte al najbaro ; Pri la spertoj dum deĵoro.

'3 Kaj rakontis al najbaroj ; Foje do la viro bona: ; "Estis antaŭ dudek jaroj ; En la urbo garnizona.

'4 Depost pli ol tri monatoj ; Mi jam lernis servoscion, ; Ne plu mokis min soldatoj, ; Mi jam sciis preskaŭ ĉion.

'5 Baldaŭ estis sur posteno ; Mi gardonta dum deĵoro, ; Sed pro la deĵora peno ; Multe timis mia koro.

'6 Ĉiuj oficiroj estis ; Dum deĵor' ja tre kruelaj, ; Ili ĉiun tuj arestis ; Eĉ pro pekoj bagatelaj.

'7 Foje jen min alparolis, ; Min prenante ĉe la mano, ; La soldato Karlo Bolis, ; Kiu estis Ĉernis-ano.

'8 "Mi nun estas jam libera, ; Kaj mi tute jam finlernis; Je la sepa hor' vespera ; Iros hejmen mi al Ĉernis.

'9 Pasis miaj servojaroj, ; Oni ne plu min deziras. ; Al amikoj kaj najbaroj ; Al la hejmo nun mi iras.

'10 Oni baldaŭ al vi donos ; Garddeĵoron ja konvenan, ; Kaj por tio do bezonos ; Vi dometon ja postenan.

'11 Novan domon vi ricevas ; Nur, pagante tridek kronojn, ; Sed por mia domo devas ; Pagi vi nur dekdu kronojn.

'12 Dudek kronojn ĝi valoras. ; "Sed, amik', mi ne komprenas, ; Ĉu ne la postendometo ; Al la ŝtato apartenas?"

'13 Mi rediris kun rideto: ; "Sed, amiko, min komprenu: ; Ĉar mi tiom vin favoras, ; Por la bagatel' ĝin prenu!"

'14 Sed la saĝa Karlo Bolis ; Vere tondre nun ekridis, ; Kaj ridante li parolis, ; Dum sur seĝon li eksidis:

'15 "Ho, do devus ja la ŝtato ; Mon-amasojn eĉ posedi, ; Se por ĉiu ajn soldato ; Volus domon ĝi aĉeti.

'16 Sed atentu, vi infano, ; Kiu timas la aĉeton: ; Kion diros kapitano, ; Se ne havos vi dometon?

'17 Li neniun ja kompatas, ; Mi multfoje tion spertis; Li postendometojn ŝatas, ; Kaj jam ofte li asertis:

'18 "Sen dometo la postena ; Ja similas gardsoldato ; Al heliko mukoplana ; En senkonka nuda stato."

'19 Kaj mi fakte ja estonte ; La dometon ne bezonos, ; Kaj pro tio mi volonte ; Ĝin per vend' al vi transdonos.

'20 Prenu vi do la dometon! ; Ĉe la ĉefgardej' ĝi staras. ; Ne vi pentos la aĉeton ; Kaj vi dek ok kronojn ŝparas."

'21 La afer' al mi tre plaĉis. ; Ĉar dometon mi bezonis, ; Mi aĉeti ĝin kuraĝis ; Kaj mi tuj la monon donis.

'22 Karlo Bolis tuj foriris. ; Bonhumore kaj kun rido ; Li antaŭe al mi diris: ; "Fartu bone! Ĝis revido!"

'23 Kaj mi mem post kvaronhoro ; Al la ĉefgardej' rapidis, ; Kaj kun ĝojoplana koro ; La dometon mi ekvidis.

'24 Vere bela, plenvalora ; Estis la postendometo, ; Preskaŭ nova, verdkolora: ; Vere bona do aĉeto.

'25 Tuj mi iris ĝojoplene ; Al la kaporal' trankvile. ; Mi salutis lin konvene ; Kaj mi petis lin ĝentile;

'26 "Via moŝto kaporalala! ; Ho permesu kun kompatato ; Ke min en dilem' fatala ; Nun asistu gardsoldato.

'27 Helpu min la vir' koncerna, ; Mian jen postendometon ; Porti al la kort' kazerna. ; Ne rifuzu mian peton!"

'28 Sed la kaporal admone ; Diris tuj per voĉo kria: ; "Iru hejmen, dormu bone, ; Vi drinkulo plenebria!"

'29 Mi antaŭen faris paŝon: ; "Ho, sinjoro, mi protestas! ; Se postulas mi proprajon, ; Ĉu do mi ebria estas?

'30 La dometo estas mia, ; Ĉar mi simple ĝin aĉetis! ; Kaj ne estas mi ebria, ; Kaj ĝentile mi vin petis.

'31 Kaj mi nepre ne ĝin cedos! ; Ne obstinu, kaporalo, ; Aŭ laŭleĝe mi procedos ; Per akuz' ĉe tribunalo."

'32 "Trankviliĝu! Bone, bone! ; Vi ricevos la dometon!" ; Kaj li diris telefone ; Nun al iu mian peton.

'33 Kaj mi pensis kun rideto: ; "Li nur tial tiom krias, ; Ĉar pro bona la aĉeto ; Li treege min envias."

'34 Kaj post kvaronhor' eniris ; Oficiro eminenta, ; Kaj la kaporalo diris ; Kun respekto evidenta:

'35 "Regimenta kuracisto! ; Ho sinjoro oficiro! ; Mi vin petas kun insisto: ; Temas pri ĉi tiu viro."

'36 Mi komprenis la aferon ; Kaj la kaŭzojn mi divenis: ; Por subpremi sandanĝeron ; Jen la kuracisto venis.

'37 Kaj li devas laŭordone ; La dometon nun esplori, ; Ĉu do oni povas bone ; En ĝi loĝi kaj deĵori.

'38 Sed li simple min aliris; Faris pulsan li esploron, ; Kompateme jen li diris: ; "Ĉu vi havas kapdoloron?"

'39 Mirigite mi ridetis, ; Nean signon tuj mi faris, ; Kaj ĝentile mi lin petis: ; "Ho sinjoro, vi eraris!

'40 Ne malsano min katenis. ; Do bonvolu ne min ĝeni: ; Mi ĉi tien ja nur venis ; Por dometon mian preni."

'41 "Bone, bone, kara viro! ;
Vi atendi iom devos, Kaj tuj
poste laŭ deziro ; La dometon
vi ricevos."

'42 Do denove kun persisto ;
Mi atendis en angulo. ;
Montris min la kuracisto: ;
"Jen deliro de drinkulo!"

'43 Mi rapide sed deklaris: ;
"Ho sinjoro oficiro! ; Pri la
nomo vi eraris: ; Mi nomiĝas
Sagopiro."

'44 Li ridetis plenkompatate, ;
Ion kaŝe li murmuris, ;
Sammomente sed surstrate ;
Savodroŝko alveturis.

'45 Kaj kvar viroj tuj envenis,
; Volis preni min senvorte, ;
Kaj min treni ili penis ; Al la
droŝko eĉ perforte.

'46 Sed mi vigle min defendis,
; Furioze mi kondukis;
Koleregon mi eksentis ; Kaj
senĉese mi balbutis:

'47 "Lasu, lasu min, friponoj! ;
Mi proprajon nur deziris. ;
Fakte ja por dekdu kronoj ; La
dometon mi akiris!"

'48 Sed dum tiel mi parolis ;
Kaj ne cedis al perforto, ; Jen
subite Karlon Bolis ;
Alkondukis gardeskorto.

'49 Vinon daŭre li aĉetis, ;
Plenebria li jam estis; La
gardistojn li moketis, ; Ili sed
lin tuj arestis.

'50 "Ho sinjoro oficiro", ; Mi
la kuraciston petis, ; "De ĉi tiu
granda viro ; La dometon mi
aĉetis."

'51 Kaj la kuracist' rapidis ;
Por demandi Karlon Bolis;
Sed ĉi tiu laŭte ridis ; Kaj
sarkasme li parolis;

'52 "Jes, li fakte ĝin aĉetis. ;
Mistifikis mi la viron, ; Sed
mi fakte ne pensetis, ; Ke li
kredas mian diron."

'53 Do min trompis la fripono!
; Li mensoge diris ĉion, ; Kaj
li tuj por mia mono ; Do aĉetis
la ebrion.

'54 Ĉiuj laŭte nun ekridis, ;
Kaj mi hontis pro l' afero. ; En
kazernon mi rapidis, ; Furioza
pro kolero.

'55 sed se mi denove venus ;
Nun al regimento mia, ; Kaj se
iu homo ĝenus ; Min per
vendpropono tia,

'56 Punus, sen timeti ion, ; Tuj
mi lin per bat' kuraĝa; Ĉar por
kredi ree tion, ; Estas multe mi
tro saĝa!"

& Kanto pri Modrý Kameň, Divín kaj Zvolen:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 2300 paŝoj dum 26 minutoj. El slovaka tradukis Štefan R. Seemann (Slovaka antologio, 1977). Baladigis Martin Strid per melodio de slovaka popolkanto kaj nova rekantaĵo.>

<https://www.youtube.com/watch?v=WgLqb2q-d2A>

(#Melodio:

(/Lado TiLa miso fami; redo mire LaLa TiLa; lala laso fafa fami;

(# Rekantaĵe: lami mire dodo doTi doTi; Lado TiLa miso fami; redo mire La La)

)×92)+

(&Strofoj:

'1 Vastebene, en la valo ;
staras tie fortikaĵo, ; mur-
ŝirmita Beogrado.

(×: **Paŝu per la plandoj, bela bando! ; En la bona Hungarlando ; paŝu per la plandoj!**)

'2 Loĝas ĝin l' imperiestro ;
imperia regadestro, ; jes, la
turka mastrumestro.

'3 Antaŭ li staras du Turkoj, ;
la du Turkoj, du paŝaoj ; sur
siaj karaj ĉevaloj.

'4 Mallaŭt-voĉas mem la estro
; imperia, regadestro, ; jes, la
turka mastrumestro.

'5 "Hajŝi, hajŝi, mastrumestro,
; lasu nin iri batalon ; en la
bonan Hungarlandon,

'6 konkeri kastelojn, urbojn, ;
hakmortigi maljunulojn, ;
alkonduki la junulojn!"

'7 Ekparolas mem la estro ;
imperia, regadestro, ; jes, la
turka mastrumestro.

'8 "Ne permesas mi batali, ;
urbojn, kastelojn ataki ; en la
bona Hungarlando!

'9 Tiu lando bona estas, ; el ĝi
interezoj venas, ; kiujn ĝi ĉi
tien sendas!"

'10 "Ne lasante nin batali, ;
urbojn, kastelojn ataki ; jen en
bona Hungarlando,

'11 vian landon ni prirabos, ;
nenion ni al vi lasos, ; la val-
teron malbonfaros!"

'12 Ekparolas mem la estro ;
imperia, regadestro, ; jes la
turka mastrumestro:

'13 "Hajŝi, hajŝi vi du Turkoj,
; du vi Turkoj, du paŝaoj ; en
viaj karaj blank-burgoj!

'14 Jam permesas mi batali, ;
urbojn, kastelojn ataki ; en la
bona Hungarlando.

'15 Anstataŭ, ke l' tero vale ;
malboniĝu viafare, ; respondas
mi do afable:

'16 Iru, iru vi batali, ; urbojn,
kastelojn konkeri ; en la bonan
Hungarlandon!"

'17 Tuj ili tendaron prenis, ; al
Modrý Kameň altrenis, ; la
kastelon eksieĝis.

'18 Sub kastelon ili venis, ;
alpafadi ĝin komencis, ; al la
gardistar' parolis:

'19 "Ho, junular', junuloj vi, ;
subordigu kastelon vi, ; ĝin
detruu ne devu ni!

'20 Bonvolu ĝin subordigi, ;
ne lasu ĝin detruigi, ; honte
devus vi eliri!"

'21 La junuloj tuj rediris, ;
laŭte la Turkojn alkriis, ; kaj
sin por batal' preparis:

'22 "Ni kastelon ne subigos, ;
nek vi ĝin de ni forprenos, ;
honte vi de ĝi foriros!"

'23 Du Turkoj sen tempo-
perdo ; zorgis pri kanon-
lokigo ; ĝustaloke sub kastelo.
.....

'24 El negrandaj pafis ili, ; por
la murojn malfortigi, ; bel-
bastionon fendigi.

'25 Truoj en la mur' ekestis, ;
la junuloj tien venis, ; kie
Turkoj sturm-intencis.

'26 Ili la Turkojn atakis, ; ilin
eniri ne lasis, ; forte kun ili
batalis.

'27 ĉar al ni la help' ne venis, ;
Turkoj la junulojn venkis, ;
perfideco ilin helpis.

'28 La kaptitojn ili ligis, ;
antaŭ la kastelon gvidis, ; tie
ilin senkapigis.

'29 La kastelon ekpreninte, ;
per siaj ĝin loĝiginte, ; Turkoj
tuj al Divín venis.

'30 Al gardantar' ili vokis, ;
por Divín'on subordigi ; kaj ne
lasi detruigi.

'31 La junular' reen vokis, ; la
Turkojn voĉeg-alkriis ; kaj
tiele alparolis:

'32 "Ni kastelon ne subigos, ;
nek vi ĝin de ni forprenos, ;
honte vi de ĝi foriros!"

'33 Du paŝaoj senprokraste ;
ordonis pafadis haste, ; por
kastelon ekkonkeri.

'34 Ili la rokojn pafadis, ; sed
la kugloj defaladis, ; pri tio
Turkoj miradis.

'35 Sepcent foje ili pafis, ;
samajn lokojn alpafadis - ;
Zahoranoj ĝin nombradis.

'36 Tiutempe tranĉo-signo ;
noĉis Zahoranoj ligne, ;
kiomfoje ĝi pafite.

'37 Sed Francisko Ŝiroký nun ;
- estis kapitan' de Divín - ; el
kastel' subenigis sin.

'38 Turkoj tuj lin kapte prenis,
; al paŝaoj kun li venis, ; laŭ
ordon' turmenti devis.

'39 Ili krude lin turmentis: ;
"Diru, kiel ni pafadu ; Divín
kastelon rompadu!"

'40 Li paŝaon alparolis, ;
klarigon ĉi tian donis, ; dume
korŝire ekploris:

'41 "Se vi pafojn tiel celos, ; la
kastelon vi ne prenos, ; honte
vi foriri devos,

'42 ĉar vi natur-ŝtonon pafas! ;
De sube kanonojn trenu, ; tiel
la kastelon prenenu!"

'43 Du Turkoj do senprokraste
; ordonis kanonojn haste ;
eklokigi laŭkonsile.

'44 Tuje kuglojn alpafigis, ; la
bastionon fendigis, ; kaj la
muroj malfortiĝis.

'45 bastionon ili rompis, ; kaj
la muroj deŝutiĝis, ; Turkoj al
sturm' prepariĝis.

'46 Tion junulaqr' vidante, ; la
fendojn tuj okupante ; kun la
Turkoj bat-kontaktis.

'47 Arde ili bataladis, ; multaj
Turkoj dume falis, ; kun pluaj
forte batalis.

'48 Turkoj junaj sturmi iris, ;
jun-vin' ilin kuraĝigis, ; ili
aŭdac-koraj iĝis.

'49 Kiam la gardantar' vidis ;
tion, tuj ĝi trista iĝis, ; tamen
la sturmon kontraŭis.

'50 Unu bravul' tion kaŭzis, ;
el Víglaš Divín'on iris, ;
multajn Turkojn man-
mortigis!

'51 Urban' Ŝkodný lia nomo, ;
help-servisto, forta homo, ;
senpara en la kastelo.

'52 Aŭskultu, kion li faris, ; en
la kelo li sin baris, ; kaj tie sin
defendadis.

'53 La Turkoj alkuris are, ; por
lin mortigi batale, ; li sin inter-
mure kaŝis.

'54 Turkoj la kelon sturmadis,
; la kelan pordon disbatis, ;
hom-ofere alirprovis,

'55 alian vojon ne havis, ; sur
kadavroj ili paŝis, ; kiujn
Škodný mem kort-batis.

'56 Li tuj ĉe l' fendoj ekstaris, ;
kaj mortigis multajn Turkojn,
; janiĉarojn kaj Tatarojn.

'57 Kiam liaj fortoj ĉesis, ;
novan finton uzi devis, ; por
ĝin fari jene ekis.

'58 Bareleton li alrulis, ; pulv-
enhavon li disŝutis ; en la kel'
sur ĉiu loko.

'59 Rapide tindreton prenis, ;
brulantan en pulvon ĵetis, ;
ĉiujn mortigis eksplodo.

'60 La paŝaoj senprokraste, ;
ordonis al Turkoj haste, ; lian
kapon palisumi.

'61 Post konkero de l' kastelo ;
sur plac' sekvis hakmortigo ;
de l' kastela gardantaro.

'62 Kaŭzis la sepdek junuloj ;
morton ja de sepcent Turkoj, ;
janiĉaroj kaj Tataroj.

'63 Johan' Baláži turniĝis, ;
kap' lia al ter' kliniĝis ; kaj li
korŝire plor-diris:

'64 "Ne domaĝas mi Divín'on ;
fortan, nek Modrý Kameň'on ;
- ĉar ja estas de Di' l' bato. -
.....

'65 Sed domaĝas mi l'
junulojn, ; miajn bonegajn
helpulojn ; kaj belegajn
batalulojn.

'66 Ho se ilin nun mi havus, ;
kontraŭ Turkoj mi batalus, ; la
kastelojn rekonkerus!"

'67 La Turkoj spionon havis, ;
kiam sub Zvolen restadis, ; lin
hungar-tendaren sendis.

'68 La perfidul' ĉie gvatis, ;
kun ili Víglaš'on venis, ; en
tendar' rapidi penis.

'69 Poste al Turkoj revenis, ;
kun paŝaoj li parolis, ; al ili
jene raportis:

'70 "Ne atendu la sinjorojn, ;
ili havas ja junulojn ; kaj
elektitajn helpulojn,

'71 batalulojn kaj ministrojn, ;
kampanojn kaj Germanojn, ;
Slovakojn, Silezianojn!"

'72 Turkoj tion ekaŭdinte, ;
pretis tuj enseliĝinte, ; por
baldaŭa forkurado.

'73 Se sin montrus
Zvolenanoj, ; aŭ ĉe l' alven' de
l' Hungaroj, ; laŭ sci' de Di'
forus Turkoj.

'74 Sed la niaj kion faris, ;
post antaŭaj veadkrioj ; pri
konker' de du kasteloj.

'75 Ili tuj sin fuĝe turmis, ;
pafilaron forveturis, ; pro savo
de siaj koloj.

'76 Ili lasis solan ulon, ; jam
maljunan batalulon, ; preskaŭ
sen-ulan kastelon.

'77 Ke li tempon ne malŝparu,
; fermadon de l' pordoj faru, ;
al Turkoj paf-malavaru,

'78 ĉar al li oni ordonis, ; paf-
eblecon ankaŭ donis, ;
Turkojn ektimigi volis,

'79 pajlo-virojn man-farigis, ;
en la fenestrojn starigis, ; por
la Turkojn ektimigi.

'80 Sed tio timon ne vekis, ;
per sola sturm' Turkoj venkis,
; en Ŝomoŝ loĝadon prenis.

.....

'81 Ŝomoŝ estis okupita, ; la
gardant' palisumita, ; Turkoj
mem lin ekzekutis.

'82 Revenis al estro sia ;
Hungarlandon prirabinte, ; et-
junulojn kunpreninte.

'83 "Vi imperiestro nia, ;
gloreaga reganto nia, ; bonkora
vi mastro nia!

'84 Dankas ni pro via graco, ;
prom permeso por batalo, ; en
bonahungara lando!

'85 Ni sciigon diri venis, ; tri
kastelojn alkonkeris, ; por vi
junuletojn prenis.

'86 Akceptu de ni, vi estro, ;
plej glorega regadestro, ; tiujn
niajn donacetojn!"

'87 La imperiestro dankis, ;
ĝojeg-esprimoj ne mankis, ;
kaj ilin li pridonacis.

'88 Ho, Sinjoro granda nia, ;
petas vin kristanar' via, ;
forigu potencon Turkan.

'89 Ke la krueleaga Turko, ;
pagan', Tatar' kaj Germano ;
estu ĉiuj hontigitaj.

'90 Bonvolu Di' mem direkti, ;
potence batal-protekti, ; ne
lasu nin pereigi,

'91 ke popol' vinkonfidita ; kaj
al vi rekomendita, ; estu
ĝismorte ŝirmita!

'92 Jezu' Krist', kara Sinjoro ;
donu al ni tere pacon, ; gvidu
nin en vian landon!

& Sigmunda balado pli nova:

< Rekante 18 el 31 kaj 27 el 41 batoj por strofo, entute 2366 paŝoj dum 25 minutoj. Norda Kantaro #4411. Du partoj kun ĉiu siaj melodio kaj rekantaĵo. Verkis Jens Christian Djurhuus. El feroa tradukis Martin Strid (2014 kaj 2016). Duoble tradukiĝis strofo '31 kaj '64. Klarigo (*): '1 Trankvilo: ankaŭ senvento. '48 Grundoagreso: Loko kie sub mara surfaco roko malprofunda rompigas ondojn.>

(#Melodio:

<1,6:>

(# Unua parto: <:31> /mi mi dolre mi so soosomi re lso; soososo so3so fami re lfa; (# Rekantaĵo unua: mire do do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do))×34

<[La:do]>

(# Dua parto: (# Rekantaĵo dua: mifa so sola soso fami re do; dore mifa soso sofa miimifa so so; la lati 'DO ti lala so; mifa so sola soso fami re do) (<:41> soso; /so milfa so so lala so so; la lati 'DO'DO titi la so; #"Rekantaĵo dua")×32)

)+

(&Strofoj:

,& Unua parto:

'1 /En Ferooj loĝis du estraj homoj ; Trond kaj Sigmund iliaj nomoj.

(×:; **Norvegoj, dancu nun trankvile*** ; ĉiuj ni **trankvilas ; rajdantoj, norvegoj ; dancu nun trankvile.**)

'2 Sigmundo2 loĝis en Skuvo torfa ; Loĝis Trond ĉe Geŭta golfo.

'3 Kolera2s Trond, li pensas minacon ; Sigmund forverŝis nian donacon.

'4 Trond sida2s en sia domicilio ; "Venigu Ŝeŭron Tolakfilon.

'5 Venigu² Gutaon kaj Toron
 çapan ; &&
 frap klap knap lap nap eskap
 Tor esplor por sonor

'6 Envenis knaboj kaj tiel
 diras: ; "Kion vi, Trond, de ni
 deziras?" "

'7 "Mi lasis al vi mesaĝon
 porti ; por ke vi helpu ke
 Sigmund mortu.

'8 Lancojn akriĝu, trançilojn
 akriĝu ; pri vivo de Sigmund
 ni intrigas.

'9 Çi mia konsilo bone bakos:
 ; Lin çi nokte ni atakos."

'10 Ili kolektis fraŭlojn kaj
 virojn ; kaj çiuuj kune al bordo
 iras.

'11 Kaj veli^{2s} Trond
 Skuvojafjordon ; ŝipo kurbiĝis
 kiel selkordo.

'12a Nokto malhelis kaj ŝipo
 iris ; ja mildan ŝarĝon Trond
 akiris.

12b Nokto malhelis kaj ŝipo
 kuris ; rekte Skuvon ili
 veturis.

'13 Nokto malhelis, kaj ŝipo
 naĝis, ; ili rekte al Skuvo
 vojaĝis.

'14 Alvenon gardis neniu
 patrolo ; çio okazis laŭ Tronda
 volo.

'15 Ili bru²igis armilojn forte ;
 Baldaŭ dispeciĝis pordo.

'16 Sigmund vekigis el dormo
 haste: ; "Kiu enrompas nokte
 çe min draste?"

'17 "Lin kiu rompas vian
 pardon, ; vi malamis pro
 malakordo."

'18 Sigmundo² glavon tenis
 por pre^{2d} ; kvin falis kapoj al
 Tronda pie^{2d}.

'19 Sigmundo² hakas per forta
 malmi^{2ld} ; tri falis kapoj sur
 Tronda ŝi^{2ld}.

'20 Trond kole²riĝis ti^{2ome} ;
 "Faru nun fajron al Sigmunda
 domo."

'21 Sigmund pa²rolas
 klananojn siajn ; "Nun mi
 forkuros domon mian."

'22 Sudinsu^{2l}-Ajnar, fratulo
 To^{2r} ; neniu alia kun li iris
 fo^{2r}.

'23 Sigmunde²dzino staras çe
 mu^{2r} ; "Min aŭdu, Geŭta
 Trondo nu^{2r}!

'24 Se kontraŭ edzino kaj idoj
 batalas ; pli ol urso vi
 skandalas ? brutalas."

'25 "Fajron estingu, trançilojn
 eningu! ; Nur Sigmundvicon
 mi volas atingi."

'26 Trond sin turnis de la burgo ; rekte sin al Sigmund li turnis.

'27 Trondo tian vorton deklaras: ; "Mi Sigmundan spuron flaras."

'28 Trond petas ilin havi kredon: ; "Mi sentas fumon de Sigmund-piedo."

'29 Ili arbareton verdan iris ; kaj momenton tie tiris.

'30 Sigmundo trovis eskapon ; kuŝis kampe Stejngrim-kapo.

'31a Sigmundo poste for kuris ; for el la mano la glavo veturis?susuris.

'31b Sigmund kuris poste de l' merdo ; glavon el la mano perdis.

'32 Sigmundo fuĝis insulan nordon ; Trondo havis tiam virvorton.

'33 Sigmund ĵetas sin en la maron, ; Ejnar kaj Toro same faras.

,& Dua parto:

(×: **Ĉar neniu kuraĝas tion venĝi ; Ĝojaj rajdas miaj viroj tion agendi ; Ĉiuj laŭdiĝi emas ja ; Ĉar neniu kuraĝas tion venĝi.**)

'34 /Kiam Trondo tion vidis ; re al boato li rapidis.

'35 Re al boato li tre hastas ; tamen de Sigmund for li lastas.

'36 Naĝas tri tre for de bord' ; fluofortas en la fjord'.

'37 Toro post si rigardas: ; "Ejnar lacas jam kaj tardas."

'38 Sigmund faris klopodon multan: ; li metis Ejnaron sur sian ŝultron.

'39 Tor al Sigmund manon tiris: ; "Nun jam Ejnaro ĉesis spiri."

'40 Sigmund Ejnaron lasis ; Sudinsulfjordon tomben li pasis.

'41 Sigmund kun fratulo naĝas ; daŭre fjordanoj sekvis laŭ plaĝo.

'42 Tor ekkuŝis en ondo cede ; "Lacas mi mane nun kaj piede."

'43 Vi naĝu al tero, ne zorgu min! ; Mi perdiĝis, sed savu vin."

'44 Sigmund respondis, li sidis en maro ; "Ni ne disiĝos, fratulo kara.

'45 En multa2j iroj kunis ni ; fratulo, ne disos ni tie ĉi."

'46 Sigmund vortis sen rimorso ; li metis Toron sur sian dorson.

'47 Sigmund naĝas per ĉiu forto ; "Atingos baldaŭ ni al bordo'."

'48 Rando2j rompis grundoagrese* ; Toron tiras al fundo jes.

'49 Sigmund estis brava viro ; sed gamboj ne portis lin por iro.

'50 Kiam li tiom longan vojon naĝis ; ekkuŝis kviete li sur plaĝo.

'51 Torgrim posedis ĉe Sandvujk-bord' ; li elrigardis matene tra pord'.

'52 Torgrim rigardis bordon muĝan: ; "Ĉu mi ne vidas ĉifonon ruĝan."

'53 Torgrim parolas al fraŭloj du: ; "Eksciu, estas io pli, ĉu."

'54 Envenas fraŭloj, tiel diras: ; "En fuko kuŝas granda viro.

'55 En fuko kuŝas granda viro, ; ĉu ne al Sigmund similas, miru."

'56 Torgrim hakilon en mano prenis ; kaj li al mara strando venis.

'57 Torgrim ri2gardas al bordo brov. ; kuŝis tie Sigmund sen pov'.

'58 Torgrim parolas al fraŭloj siaj ; "Orringo de Sigmund estos mia."

'59 "Knaboj, lin tenu je haroj porte ; dum lin mi donos vundon morten.

'60 Knaboj, lin tenu je haroj ĝis ; kapon de korpo mi hakos dis."

'61 Knaboj lin tenis je haroj porte ; dum lin donis vundon morten.

'62 Knaboj lin tenis je haroj ĝis ; kapon de korpo li hakos dis.

'63 Hejmen ili portis ringon el or' ; sed korpon en gruzon fosis for.

'64a Jen kian finon Sigmund akiris ; lia egalo Feroe ne iris.

•
'64b Jen kian finon Sigmund
ricevis ; lian egalon Ferooj ne
levis.)

& La agloj de Tatroj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 2494 paŝoj dum 28 minutoj. Verkis Samo Chalupka. El slovaka tradukis Eduard V. Tvarožek (Slovaka antologio, 1977). Baladigis Martin Strid per feroa melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/mimi mire redo dodo dodo dore mimi; mi mire mire mimi soso fami mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o)

)×86)+

(&Strofoj:

,& Parto unua:

'1 Jen, la agloj de Tatroj,
bravaj batalantoj, ; flugis el
siaj hejmoj super montoj,
kampoj,

(×: **Bruas dancu en halo,
dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas
ni en esperanto-kunven'.**)

'2 alflugis al Danubo, la
ekstrema rando ; de sia
patrujo, de la slovaka lando.
.....

,& Parto dua:

'3 Ondo ondon postsekvas,
Danubo murmuras, ; super ĝi
jen kastelo forta blanka turas.
.....

'4 Sub ĝi la Romianoj
konstruis tendaron, ; vicoj de
blankaj tendoj kovras la
kamparon.

'5 Sur la ora trono en centro de
l' tendaro ; sidas la reĝ' romia
inter gardistaro

'6 kaj antaŭ la regnestro startas
grupo eta; hejmaj jen herooj
kun armilar' brileta.

'7 Kapojn iliajn ornamas
blonda hararo, ; vikle
ĉirkaŭrigardas blua okulparo.

.....

'8 Altaj kiel abioj, kiel rokoj
fortaj, ; kvazaŭ de l' sama
patrino filoj senmortaj.

'9 Lando bela - tra ĝi muĝa
kuras danubo ; kaj Tatroj kiel
muro turas al la nuboj.

'10 Tiuj montoj, herbejoj jam
de tempoj foraj ; estas patruj'
de tiuj slavaj filoj gloraj.

'11 La slovaka gento sendis
ilin kun sia ; saluto al la
imperiestro romia.

'12 Ili ne batas antaŭ li per
frunt' la teron - ; Slovakoj ne
konas tian sklav-manieron.

'13 Ili per pan' kaj salo lin
saluti volas, ; lin per kuraĝaj
vortoj jene alparolas:

,& Parto tria:

'14 "La slovakaj princoj,
popolo tuta nia ; vin salutas
per ni, moŝta estro romia.

'15 Landon tiun, kiun invadi vi
ordonis, ; Dio jam en
pratempo al Slovakoj donis.
.....

'16 Jen, ĉi tie tra ĝi Danuba
muĝa kuras, ; kaj tie bastione
Tatroj al ĝi turas.

'17 Lando ĝi benita! Kaj dank'
al Dio donas, ; ĉar al laboranto
ĝi ĉiam panon donas.

'18 Ni ne atakadas rabe
gentojn aliajn, ; plugas kaj
rikoltas ni sole kampojn niajn,
.....

'19 fremdajn ne aspiras. Kaj se
kun pura koro ; fremda homo
venas de proksim' aŭ de foro,
.....

'20 li nur venu pace, sen
armilo en mano, ; ĉiam ni lin
akceptos kun salo kaj pano.
.....

'21 Diras Di-donita ĉef-leĝo
slava ĝuste: ; sklavi estas
honto, sklavigi pli maljuste.
.....

'22 Kaj homo homon ne regu!
Laŭ slava moro ; la plej sankta
estas: libero kaj honoro!

'23 Ofte nian landon sovaĝaj
atakantoj ; invadis, dezerton
faris el niaj kampoj,

'24 urbojn cindrigis kaj la
popolo mizera, ; multe
suferinta, fariĝis mallibera.

'25 Kredis jam la venkint'
fiera, ke li restos ; poreterne
en la slovaka lando kaj festos,
.....

'26 vivos el laboro nia; sed li
sin trompis: ; donis Dio
feliĉon, ni la jugon rompis!

.....

'27 Tiuj, sub kies jugo kruela
ni veis, ; kie estas? - Ni vivas,
sed ili pereis!

'28 Ĉar pri Slovakoj en la
libroj de la sorto ; - kiel pravas
jarcentoj - tia staras vorto:

'29 Al Slavoj de la ĉielo donita
lando ; tombo fariĝos por
murdema konkeranto.

'30 Diru do, ho reĝo, ĉu mano
via forta ; al ni estas glavon aŭ
oliv-branĉon porta!

'31 Sciu: se kun glavo al ni, vi,
reĝo, venas, ; glavojn havas
ankaŭ ni, kaj firme ilin tenas.

.....

'32 Sed se vi alvenas amike
kaj en paco, ; pli ol ni vin
benu Dio per sia graco.

'33 Panon, salon portas ni
signe de favoro - ; prenu, kiel
ni donas, kun favora koro."

.....

,& Parto kvar:

'34 Rifuzis la donacojn la reĝo
romia, ; ofendit-orgojle brilas
vizaĝo lia,

'35 kaj al slavaj senditoj desur
sia trono ; ora li ekparolis per
ĉi tia tono:

,& Parto kvin:

'36 "Min, al kiu la tuta mondo
apartenas ; kaj kiu ties sorton
en la manoj tenas,

'37 min aŭdu, Slavoj, kaj bone
memoru tion: ; en la tuta
mondo vi trovas nur nacion,
.....

'38 kiu nin obeas, aŭ kiu jam
pereis, ; ĉar ĝi obeemon al
Romio forneis.

'39 Subiĝos ankaŭ vi, kaj bela
lando via ; fariĝos propraĵo de
popolo alia.

'40 Triboj viaj spitaj venos al
Rom' sub jugo, ; paŝtos niajn
brutojn kaj laboros per plugo.
.....

'41 Junulojn viajn mi al arme'
mia sendos, ; en kask' romia
ili Romion defendos.

'42 Kaj se iu kontraŭ miajn
ordonojn agos, ; por sia
ribelemo li per kapo pagos,
.....

'43 ĉar mi regas Romion kaj
Romo la Tutmondon! ; Vi
aŭdis mian volon kajmian
respondon."

,& Parto sesa:

'44 Tondras la reĝ' fiera, sin sentante prava, ; sentime aŭskultas la senditaro slava.

.....

'45 Sed fine ekbolis la sango de l' bravuloj, ; fiksrigardis la reĝon iliaj okuloj

'46 kaj siajn fulmo-sagojn kontraŭ lin elpafis; tuj la junulojn siajn armilojn ekfrapis,

'47 ĉar kolero granda korojn iliajn tuŝis, ; kaj buŝoj iliaj fortan krion elpuŝis;

'48 "Frapu!" ekkriis ili, kaj jam brila glavo ; fulme lumas en la mano de ĉiu Slavo,

'49 "frapu!" kaj atakas la reĝon kiel ondo: ; por la romia orgojlo jen slava respondo!

.....

,& Parto sepa:

'50 Nu, montru, reĝo, ĉu estas tiom da forto ; en glavo via, kiom en fiera vorto!

'51 Sed li, volanta alies liberon preni, ; mem ne kuraĝas glavon en mano teni;

'52 inter la gardistaron kuras la poltrono ; kaj en polvo ruliĝas lia ora trono;

'53 la Slavoj al li sian vojon trabatalas, ; unu post la alia la gardistoj falas.

,& Parto oka:

'54 Eksonis trumpetoj kaj tintegas armiloj, ; leviĝas la tendaro, ; da soldatoj miloj

'55 kaj atak' post atako ondas al la lokoj, ; kie kontraŭ la reĝo batalas la Slovakoj.

'56 Teron frapante polvon levas hufobatoj, ; akre sonas ordonoj, krioj de l' soldatoj,

'57 kaj jam eta slava batalantaro ; ĉirkaŭata estas de malamika maro.

'58 Ĉiu devas batali eĉ kontraŭ cent glavoj, ; sed malamikojn siajn ne kalkulas Slavoj,

'59 nur batas. - Ho, batu, dum sango via bolas, ; tiun, kiu liberon vian ŝteli volas!

'60 Eĉ se vi morti devus en batal' por pravo, ; batu! Prefere morti, ol fariĝi sklavo!

.....

,& Parto naŭa:

'61 Ardas la batalo. Kaj scias grupo nia: ; ne eblos rezisti al fortego romia;

'62 sed se morti oerdonas al ili
la sorto,; ili mortos honeste:
per bravula morto!

,& Parto deka:

'63 Kaj Slavoj niaj, dum batal'
sovaĝa ardas, ; al lando sia
fora lastfoje rigardas:

'64 al montoj kun rokaj pintoj
ili rigardas, ; kiuj la slavajn
limojn ekde ĉiam gardas;

'65 kie la sanktaj boskoj de
arboj multjaraj ; kaŝas la
templojn de dioj al ili karaj,
.....

'66 kie parencaro en domo ĉe
rivero, ; la tomboj de avoj en
apud-doma tero,

'67 de l' avoj, kiuj la popolon
konsil-gvidis, ; batalis kontraŭ
tiuj, kiuj ĝin avidis;

'68 korpoj iliaj jam putras sub
ter-tavolo, ; sed nomoj iliaj
vivas en la popolo.

'69 La junulojn inspiras la
iama gloro, ; per sankta koler'
ekflamas ilia koro,

'70 pli terure ili glavojnsiajn
eksvingas ; kaj fulme batas,
kien ili nur atingas,

'71 Krakas la kiraso kaj la
ŝildoj fendiĝas ; kaj la romiaj
kaskoj en polvo ruliĝas.

,& Parto dekunua:

'72 Mortas ankaŭ la niaj en
sankta ofero, ; sed neniu veas,
malgraŭ ega sufero;

'73 ili sangon sian verŝas laŭ
propra volo - ; ja ne doloras
morti por sia popolo!

,& Parto dekdua:

'74 La batal' jam ĉesas; la
terura tempesto ; furiozante
sin forkonsumis sen resto;

'75 kajla batalintoj kontraŭ
reĝo romia ; - ĉar li venis al ili
kun intenco fia -

'76 kie estas? - Ho, Tatroj,
fiera montaro, ; neniam plu
revenos via junularo.

'77 Tie, kie nian landon
Danubo tuŝas, ; tie ili ĉiuj en
sango ruĝa kuŝas.

'78 Restis eĉ neniu por fari
raporton, ; ke al mallibero ili
preferis morton.

'79 Kaj ili ĉiuj kuŝas sur
bravulaj litoj; ; sur amasoj de
malamikaj mortigitoj.

'80 Ili jam mortis, sed glavon
eĉ nun, postmorte, ; man'
rigida ne lasas, sed ĝin tenas
forte.

,& Parto dektria:

'81 Post venko la reĝo ja
triumfi kutimas, ; sed nun ne;
ĉu la mortigitajn Slavojn li
timas!

'82 Ne, sed falintoj liaj antaŭ
li, jen, montas, ; tial pro venko
sia li eĉ ĝoji hontas.

,& Parto dekkvara:

'83 Eterna honto premu
invadinton fian, ; kiu venas
por subjugi popolon nian!

'84 Sed kronu ĉiun bravulon
eterna gloro, ; kiu por la
popolo mortis en honoro.

'85 Do, frapu kaj batu, dum
sango via bolas, ; tiun, kiu
vian liberon ŝteli volas!

'86 Eĉ se vi morti devus en
batal' por pravo, ; batu!
Preferu morti ol fariĝi sklavo!
.....)

& Drako Longa:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 2523 paŝoj dum 27 minutoj. Norda Kantaro #4414. Klarigojn vidu post la strofoj.>

(#Melodioj:

<1,6:29> (

(#Strejmoja: omi /miimimi mire redo dodo; dododo dore mimi; mimi mimi mire mimi; soso fami mimi; (#Rekantaĵe: redo re rere mire; do rere re; rere mire doTi La;So So LalTi do))?

(#Varianto B: odo /doododo dore doTi LaSo; dododo dore mimi; mifa mire remi mifa; mire remi fa; (#Rekantaĵe: mido re rere mire; do rere re; rere mire doTi La;So So LalTi do))?

(#Suduroja: odo /dooSoSo LaTi dodo dooTi;Ti TiLa LaSo SoMi; SoSo LaTi dodo doTi; TiLa LaSo LaSo; (#Rekantaĵo: MiSo So FaMi redo; do dodo re; rere mire doTi La;So So LalTi do))

)×87)+

(&Strofoj:

'1 Ĉu /volas vi odon aŭdi mian ; ĉu volas vortestimojn? ; Pri Olavo Trigvafilo* ; jen sin turnos rimoj.

(×.; **Bruas dancu en halo; dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj rajdas norvegoj ; al luktku2nven'**.)

'2 Konstrui ŝipon igas reĝo ; jen sur sabla strando ; Drako Longa plej granda estis ; farita en norveglando.

'3 Fariĝis ŝipo en norveglando ; bonis en ĝi konstruo ; dek ok ulnojn kaj kvardek estis ; kilo inter pruoj*

'4 Orumaj estis ambaŭ pruoj ; bluaj tabuloj estis ; orajn ŝildojn mastoj havis ; ja rakontoj atestis.

'5 Reĝo sidas en alta seĝo ; al siaj viroj parolas ; "Ni ekvelos sur sala maro ; mi tion delonge volas.

'6 Nun alportu militvestojn ;
kirason kaj glavon gliman ;
poste lanĉu ni de l' tero ; kaj
velu de norvegreĝimo."

'7 Ĝojaj kaj gajaj la fraŭloj
diris ; "Estro, kun vi ni velos ;
ĉu vi vojaĝos pace, milite ; ne
timas ni ondojn ŝvelajn."

'8 Venis viro malsupren de l'
montoj ; fortan arkon tenis ;
"Pro via jarlo Ringoregna* ;
mi ĉi tien venis."

'9 Reĝo tiel ekparolas ; ĝoja
jam tiome ; "Diru al mi, vi
juna viro ; vi kiu estas nome?"
.....

'10 "Ejnar vi nomu min ; mi
povas arkon streĉi ; Tambo
nomiĝas mia arko ; sagojn
kurigas breĉe."

'11 "Vi aŭskultu juna viro ; ĉu
kun mi volas veli ; estos vi
sagulo mia ; Drakan defendon
celi."

'12 Iris ili strandon malsupren
; riĉaj kaj altkreskaj ;
rultrunkojn rompis, tero tremis
; tiris la ŝipon el nesto.

'13 Malvolvis siajn silkajn
velojn ; en la maron iri ; estas
dirite, la reĝo mem ; li Drakon
Longan stiris.

'14 Vaste vojaĝis famo landon
; norvegoj elvelrapidas ; reĝo
danuja kaj reĝo sveduja ; kune
konsiliĝas.

'15 Reĝo danuja kaj reĝo
sveduja ; kunvenis por
ofensiv' ; kiel norvegujan
reĝon ; igi for de l' viv'.

'16 Al Ejrik jarlo mesaĝon ; ili
prepare sendis ; li vojaĝon
sekvos por sian ; patran
morton venĝi.

'17 Ejrik ĉe la reĝoj eniras ;
kun ruĝa ŝildo, kiraso ; "Olav
reĝo de norvegoj ; mian patron
mortigi lasis."

'18 Staras jarlo stokejplanke ;
lanco en manoj glimas ; "Olav
reĝo vidos ke ; mi akron per
akro rimas."

'19 Iris ili al bordo malsupren ;
bela kompanio ; reĝo danuja
kaj reĝo sveduja ; kaj Ejrik
jarlo la tria.

'20 Jen triopo da ŝiparoj ; el
Sundo* iris ; Fertirŝip'* unua
estis ; povis jarlo stiri.

'21 Reĝo danuja ekparolas ;
serĉas vortojn pledajn ; "Kiu
Drakon Longan prenos ; tiu
ĝin posedos."

'22 Ejrik pensas mem al si ;
"Ekscios vi malvola ; vi ne
prenos Drakon Longan ; per
dana potenco sola."

'23 Tiam parolas reĝo sveduja ; tenis tranĉilon boran ; "Mi ĝin prenos Drakon Longan ; aŭ vivon lasos for."

'24 Ejrik staras en larĝa amaso ; ruĝan skarlaton portas ; "Vi ne prenos Drakon Longan ; antaŭe mi diros vin morta."

.....

'25 Ejrik parolas al siaj viroj ; "Luktulojn ni renkontos ; staru bone kaj virece ; ĉar grundo sangiĝontas.

'26 Viroj norvegaj sur reĝa ŝipo ; kapablas tranĉe trivi ; iru antaŭen en dura lukto ; aŭ lasu ni la vivon."

'27 Ejrik parolas al Finno Malgranda ; "Apud mi vi staru ; vi defendos min mem se ; min venas danĝera faro."

'28 Lanĉis ili ŝipojn Sunden ; longe tie gvatis ; sopiris norvegajn ŝipojn ; reĝon norvegan bati.

'29 Lanĉis ili ŝipojn insule ; celis al konkero ; gardon tenis nokte, tage ; por norvega apero.

'30 Nun la baladon finos mi ; ne kantas mi jam favore ; tuj mi ekos alian kanton ; knaboj, metu memoren!

'31 Olavo celas hejmen veni ; de orienta maro* ; kiam li en Sundon venas ; vidas li ŝiparon.

'32 Estroj tri sur strando staras ; vaston vidmeditas ; kaj ekvidas grandan ŝipon ; sur la maro glitas.

'33 Reĝo danuja ekparolas ; "Ĉio min perfektas ; okulojn du min benas Ĥrist' ; nun Drakon mi Longan spektas."

'34 Ejrik staris en proksim' ; al siaj viroj diras ; "La danuja reĝo ; ankoraŭ ne Drakon vidas."

'35 Venis jen pli granda ŝipo ; viroj miras pri ; reĝo sveduja jarlon parolas ; "Nun Drakon vidas mi."

'36 Ŝipon lanĉas nun de bordo ; mane remilojn prenas ; "Ne lasu foriri jam Olavon ; malmultaj egalon tenas!"

'37 Ejrik rigardas al la maro : al siaj viroj diras ; "Ĵuras mi je vera dio ; vi ankoraŭ ne Drakon vidas."

'38a Reĝo danuja kaj reĝo sveduja ; tenas anson ruĝan ; "Ejrik jarlo sian patran ; morton venĝi fuĝas.

'38b Reĝo danuja kaj reĝo
sveduja ; dubon ili esprimas ;
"Ejrik jarlo sian patran ;
morton venĝi timas.

'39 Malbonvole la jarlo tiam ;
diris kolere ; "Pli ol vortaĉojn
vi bezonas ; por norvegojn
konkeri.

'40 Ejrik staras sur verda
kampo ; kaj li nun ekiras ;
"Estu rapidaj al la ŝipoj ; mi
Drakon Longan vidas."

'41 Ĉiuj vidis Drakon veni ;
miris atribuojn ; oraj estis la
buspritoj ; kaj silkaj veloj en
pruo.

'42 Metis ili sin batalen ; lance
kaj perglave ; bolis norvegoj
sur Drako ; ilin relukto ravis.
.....

'43 Olav parolas al siaj viroj ;
"Aĉetos min ili dure ; neniam
timas mi batalon ; hodiaŭ mi
ne forkuros.

'44 Vi metu ŝipon al batalo ;
malhisu la velojn ; lasu ilin
vidi ke norvegoj ; per glavoj
povas celi!"

'45 Ulvo Ruĝa en pruo staras ;
bonis li kaj brava ; "Ne metu
Drakon pli antaŭen ; ĉar pruan
longan havas."

'46 Reĝo staras en pobo posta
; vestita en skarlat' ; "Mia
pruulo kaj ruĝas kaj timas ;
nun mia vida konstat'."

'47 "Reĝo, neniam vi vidis
min timi ; mi bone kuraĝas
blendi ; Savu vi pobon bone
hodiaŭ ; la pruan mi
defendos!"

'48 Tiam koleriĝis reĝo ; kaj
Ulvo vortojn ekas ;
"Trankviliĝu, sinjoro mia ; ĉar
penton kolero vekos."

'49 Olav staras en ŝipofundo ;
kaj Ulvo vortojn donas ; "Kiu
posedas ĉi taŭgan ŝipon ; ĝin
mi ankoraŭ ne konas?"

'50 Reĝa frato Torkil
respondas ; langis li raporton ;
"Reĝo danuja kaj reĝo sveduja
; volas vian morton."

'51 "Timaj estas danaj viroj ;
iri kontraŭ norvegoj ; prefere
ili sidus hejme ; kapti birdajn
gregojn.

'52 Pli bone povas svedaj viroj
; oferbovlojn* sumi ; ol eĉ
proksimiĝi nin ; ke sango
glave fumu."

'53 Olav iris en la pobon ; rege
li avantaĝas ; "Kiu posedas ĉi
grandan ŝipon ; Drakon
baborde naĝas?"

'54 Respondis Herning,
bofrato reĝa ; lasis la vortojn
fali ; "Posedas Ejrik Hakunfilo
; ĉiuj lin lojalas."

'55 Al ĝi respondis Olav reĝo ;
vastas la rakonto ; "Akra estos
lukta ludo ; norveg' norvegojn
frontos."

'56 Reĝo sveduja Olavon
haltis ; en matena fru' ; estis
kiel fajron aŭdi ; ŝipojn tondra
sku'.

'57 Hakis kaj pikis norvegaj
viroj ; per lancoj kaj glavaj
klingoj ; dense falis la svedaj
viroj ; kiel herbon blovo
svingas.

'58 Reĝo sveduja krias laŭte ;
vokas ilin ĉesi ; "Perdis mi
plej multajn anojn ; malĝojas
mi konfesi."

'59 Reĝo danuja paŝis antaŭen
; gajni lin instigis ; prenis
norvegoj al li direkton ;
danojn maldensigi.

'60 Fumo staris ombre supren
; Sundo videble ruĝis ; estas
dirite ke danaj viroj ; ili devis
fuĝi.

'61 Ejrik antaŭen al Drako
haltis ; en manoj glima glavo ;
"Olav ne laŭdos sin ke mi ; de
li min baldaŭ savos."

'62 Metas ŝipon ĉe ŝipa rando ;
neniu fuĝe kuras ; kapoj kaj
korpoj en maron rulas ; vido
jen terura.

'63 Ejnar staras en batalejo ;
kun Tambo, arka nomo ; ĉiun
sagon, se pelis arko ; falis iu
homo.

'64 Ejnar staras en batalejo ; li
ne danĝeron timas ; vidas
altkreskan jarlon Ejrikon ;
stari rudron proksima.

'65 Ejnar streĉis Tamban
arkon ; sagon kordo levis ;
sag' superflugis jarlan kapon ;
rudra nabo krevis.

'66 Ejnar streĉis alimense ;
celis jarlon pafi ; sago flugis
mise-dise ; ne povis jarlon
trafi.

'67 Ejrik diras al Finno
Malgranda ; "Al vi mi parolas
; Kiu estas, per pafoj pikaj ;
trafi min li volas?"

'68 Tion respondas Finna
Malgranda ; manojn sango
gargaras ; "Estas tiu granda
homo ; en ŝipa mezo staras."
.....

'69 Diras jarlo iritmense ; "Mi
donas al vi motivon ; pafu tiun
grandan viron ; danĝeras por
mia vivo."

'70 "Mi ne povas la homon
fari ; ĉar ne havas li
mortmarkon* ; bonŝancas li
sed povas mi ; senkordigi lian
arkon."

'71 Ejnar streĉis je tria menso ;
jarlon por ataki ; kordo
rompiĝis de ŝtalo forta ; la
arko subite krakis.

'72 Ĉiuj aŭdis kordan rompon
; reĝo miras pure ; "Kio ĉi sur
mia ŝipo ; tondras tiom
terure?"

'73 Respondis Ejnar
Tambaskua ; ĵetas arkon sian ;
"El viaj manoj Norvegujo ;
rompiĝis, reĝo mia!"

'74 "Ne Tambe sed en Sinjora
mano ; mia regno restas ;
prenu unun el miaj arkoj ;
taŭgaj ili estas."

'75 "Tro malfortas reĝaj arkoj"
; Ejnar aŭdace deklaras ;
"Prenos ŝildon mi kaj glavon ;
kaj hakojn mi ne ŝparos."

'76 Plu staris homoj en ambaŭ
pruoj ; se mi pravas mense ;
estis malĝoje ŝipomeze ;
homoj fariĝis maldense.

'77 Ejrik kuris al Drako supren
; glavon mane tenis ; Herning
saltis en pobo malsupren ;
kontraŭ li poste venis.

'78 Hastis ili ŝipomezen ;
povas mi al vi diri ; poste al
Fertiro devis ; jarlo retroiri.
.....

'79 Elektis jarlo altajn knabojn
; tiaj maloftegas ; ili tuj
surkuris Drakon ; kaj devis
Herning cedi.

'80 Ulvo Ruĝa el pruo kuras ;
nun la pruo ruĝas ; tiom sango
sur Drako fluis ; ke ŝipo
aspektis ruĝa.

'81 Duris batalo ŝipomeze ;
ŝildojn glavoj klakas ; Ulvo
kaj Ejnar, grandluktuloj ;
ejrikanojn hakas.

'82 Ejrik estis aliamense ;
kiam amaso cedis ; tiam vidis
ke la pruan ; Drakan li jam
posedis.

'83 Jarlo trian ekon ekipas ;
"Lukton plu insistu!" ; Falis
tiam Ulv kaj Herning ; kaj tuta
la rezisto.

'84 Reĝo vokas el la pobo ;
"Al ni venas perdo ; saltu en
maron, miaj viroj ; fino
fariĝos merdo!"

'85 Reĝo elsaltis en la maron ;
sekvis la anaro ; reĝa frato
lasta estis ; laŭ reĝa volo faris.
.....

'86 Drakon Longan plej
kapabla ; Ejrik nun akiris
prenis li rudron mem en mano
; kaj ĝin el Sundo stiris.)

<& Klarigoj al Drako Longa:

Feroe verkis Jens Christian
Djurhuus (iam 1819-1823).
Temas pri la batalo ĉe Svolder
en jaro 1000, kiam reĝoj dana
Sven Tveskæg ("Dubarba")
kaj sveda Olof Skötkonung
("Sinoreĝo") kune venkis
norvegan reĝon Olaf
Tryggvason revenantan de
kristane misia militvojaĝo.
Melodioj #Strejmoja el centra
Feroo, #Suduroja el feroa
Sudinsulo. Tradukis Martin
Strid (2014). Duoble
tradukiĝis strofo '38.

Klarigoj (*):

'1 Olavo Trigvafilo, reĝo de
Norvegujo.

'3 Pruoj estas kaj la pruo
antaŭe kaj la samforma poŭpo
malantaŭe.

'8 Ringoregno, nuntempe
provinco en sudorienta parto
de Norvegujo.

'20 Sundo, markolo inter
Selando kaj Skanujo. ;
Fertirŝipo, aŭ Ferportanto,
estis la ŝipo de jarlo Ejrik.

'31 La orienta maro estas
Balta Maro.

'52 Oferbovloj temas pri la
granda asa templo en Upsalo.

'70 Mortmarko, signo pri
destino baldaŭ morti. >

& Jalgrima balado:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 2552 paŝoj dum 27 minutoj. Norda Kantaro #4407. El feroa tradukas Martin Strid (2014).). Du versioj estas notitaj el filmetoj interretaj, el Suđuroy (#Sudinsula) kaj Tórshavn (#Toreshavena). Duoble tradukiĝis strofoj '31, '34, '42, '60 kaj '65. Klarigojn vidu post la strofoj.>

(#Melodioj:

<1,6:29> (

(#Sudinsula: /LaLa Tido TiLa La3;Mi La Tido TiLa; dore mi3mi fami mi;mi redo mimi miLa; (#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La a))

?

(#Toreshavena: /soso sodo rere so;so milso laso soso; miso laso soso so;so mire mifa soso; (#Rekantaĵe: sola so somi re do; re rere so somi so; soso somi re do o))

)×88)+

(&Strofoj:

'1 /Unu scias rimon mi ; el vortoj trafegaj ; Jalgrimo kaj Havgrimo ; en praantaŭo regis.

(×: (&Sudinsula:; **Tondru danco tre ĉarme ; nun tretu fiere ĉiuj en la ĉen' ; staras jen mastrino.**)

?

(&Toreshavena:; **Tondru danco tre ĉarme ; tretu fiere en ĉen' ; staras jen mastrino.**))

'2 Jalgrimo kaj Havgrimo ; regis per glava rando ; unu estis en Uplando ; alia en Bjarmalando*.

'3 Sin konsilis ili kiel ; prauloj faris en fojo ; ke neniu reĝo regu ; norde de Herojo*.

'4 Venis malsupren al Bjarmaland' ; kvindek altaj rajdistoj ; kaj respondis Havgrimo: ; "Kiuj estas ĉi gastoj?"

'5 Unu el la fraŭloj ridetis ;
sub lino* respondis: ; "Harald
reĝo de Norvegujo ; li al vi
min sendis.

'6 Reĝo nin ĉi tien sendis ; ne
pro milda frukto ; aŭ impostu
teron vi ; aŭ kontraŭ ni luktu."
.....

'7 Havgrimo parolon prenas ;
diras lango kore: ; "Jen
imposto neniŭ iris ; laŭ famo
kaj memoro.

'8 Mi naskiĝis Bjarmalande ;
teron mi ne impostos ; kaj do
Harald reĝo li ; ne faru al ni
kostojn."

'9 Elportis lian tablornamon ;
faritan el pura arĝento ;
"Prenu tiun ĉefon nun ;
elportu en la venton."

'10 Metis manojn sur
Havgrimo juna ; celis lin
elporti ; prenis li sian akran
glavon ; povis kirasojn forti.
.....

'11 Eltiris sian akran glavon ;
mi ne troigas, nu ; mi ĵuras je
mia kredo ke ; li faligis
rajdistojn dek du.

'12 Fraŭloj rajdis al reĝo
hejmen ; kun vortoj trafegaj ;
"Plu regas Grimo*
Bjarmalandon ; kiel antaŭe
regis."

'13 Reĝo tiel ekparolas ; tenas
tranĉilon trivan: ; "Sola mi
Norvegujon regos ; se mi estos
en vivo."

'14 Reĝo tiel ekparolas ; je siaj
flavaj haroj: ; "Gastos ni en
Bjarmalando ; en printempa
flaro."

'15 Ĉi tio famis ĝis la jarlo* ;
supre en monto sidas ; "Harald
jam Norvegujon duone ; nun
ĉion regi avidas."

'16 Jalgrim vestiĝis frumatene
; mi memoru pove ; "Nun mi
emas al Bjarmalando ;
malnovajn amikojn trovi."

'17 Elstaliĝis irĉevalo ; ĉe
halmuron staras ; ornamita en
skarlato ; ĝis la hufaj haroj.
.....

'18 Ornamita en skarlato ; ĝis
la flanko mezo ; orumita estis
selo ; rajdis Jalgrim speze.

'19 Jalgrim rajdas en ĝardenon
; malfiksas selrimenon ; "Kia
novo Bjarmalande? ; Min
lastjare venis."

'20 Jalgrim rajdas en ĝardeno,
; serĉas vortojn ekajn: ; "Kion
pri vi en Bjarmalando? ; jen
demando veka."

'21 "Harald reĝo de Norvegujo
; al ni militon sendas ; kvindek
luktulojn li kirasis ; bone mi
min defendu.

'22 Venis jen alia gasto ;
malsupren de montoj altaj ;
naskiĝis inter Bjarmaj ogroj ;
plej similas gigantojn.

'23 Naskita inter
Bjarmgigantoj ; ogrojn plej
similas ; volas li mian bonan
filinon ; al monta ekzilo.

'24 Neniu en Bjarmalando ;
kuraĝas lin renkonti ; se
provokas iu lin ; grundo
sangiĝontas."

'25 Havgrim elvenas
frumatene ; ne malhelpu
mortonton ; nun li vidas
montogiganton ; malsupreniri
de monto.

'26 Hundoj ekis boji laŭte ;
bienon venis giganto ; tretas
kruro per plena forto ;
danĝeron aroganta.

'27 Hundoj ekis boji laŭte ;
bienon giganto venis ; tretis
forte per tuta kruro ; teron
suroj trenis.

'28 Hundoj ekis boji laŭte ;
bienon giganto iras ; tretis
forte per tuta kruro ; teron
suroj tiras.

'29 Ĉiuj muroj balancadis ; kie
li korten venis ; ĉiuj pordoj
fendiĝis ĝis ; loko por li
plenis.

'30 Kie li sidigis sin ; rompiĝis
ĉiuj benkoj ; Jalgrim tian
vorton diras: ; "Jen de ogroj
bleko."

'31a Kie li sidigis sin ; ĉiuj
benkoj krevas. ; Jalgrim tian
vorton diras: ; "Tiel ogro
devas."

'31b Kie li eksidis ĉiuj ;
benkoj krevis plore. ; Jalgrim
tian vorton diras: ; "Jen la ogra
moro."

'32 Tiam respondis
montogiganto ; vango lia
fieras: ; "Tion mi ne opinias
reĝa ; kiu ne luktulon toleras."
.....

'33 La giganto ekparolas ;
serĉas en la domo: ; "Kvejas*
mastrino Inĝibjorg ; nun emas
mi ŝin koni?"

'34a Havgrim tiam ekparolas: ;
"Mi havas regan menson ; vi
ne vidos Inĝibjorgon ; kun ĉi
tiu penso."

'34b Havgrim tian vorton
diras: ; "Mi konsilon
memoros ; vi ne vidos
Inĝibjorgon ; kun ĉi tia koro."
.....

'35 Giganto fariĝis kreve
kruela ; pravas mi sen manko,
; batis li tridek luktulojn altajn
; falen sur halan plankon.

'36 "Mem traserĉos domon mi,
; mastrinon parolen trovi," ;
iris li en altan ĉambron, ; ĝin
disen misen ŝovis.

'37 Venis giganto en la halon,
; respondas tiel de si: ; "Aŭdu
mastrino Inĝibjorg, ; ĉu paros
vi kun mi?"

'38 "Faŭko via estas terura ;
kaj longas tro la nazo, ; same
viaj makzelostoj, ;
kvaronmejlaj kvazaŭ.

'39 "Faŭko via estas terura, ;
frunto nura ero, ; nazo kiel
boata nesto, ; jen mi diras
veron.

'40 Barbo estas fulge nigra, ;
ĝis la brusto pendas, ; ungoj
kiel kapraj kornoj, ; ulnon de
fingroj etendas.

'41 Barbo estas fulge nigra, ;
ĝis la zono kapras, ; du okuloj
kiel flakoj?lagoj, ; dentoj
sovaĝapraj."

'42a Ekparolas la giganto, ;
vorti ne pli kapablos, ; prenas
mastrinon Inĝibjorgon, ; ŝiras
trans la tablon.

'42b Ekparolis la giganto, ; ne
plu povis vortojn diri, ; prenis
mastrinon Inĝibjorgon, ; ŝin
trans la tablon tiris.

'43 Prenis li ŝin Inĝibjorgon, ;
sub mantelon bluan, ; Jalgrim
saltas de alta seĝo, ; sian
glavon skuas.

'44 Prenis giganto la buntan
virinon ; eksteren al kampo
verda, ; Jalgrim donis akran
hakon ; sur lian verdon.

'45 Perdis mastrinon li de l'
sino ; malsupren sur la
grundon, ; Jalgrim ŝin ĉevalen
prenis ; rajdis arbarprofundon.
.....

'46 Jalgrim ŝin arbaren portis,
; rajde per ĉevalo, ; aŭdu vi
fama mastrinpatro: ;
"Giganton vi batalos."

'47 Jalgrim ŝin sur ĉevalon
prenis, ; al selnabo ŝnuras, ;
tiel kutimas ĉiuj rajdistoj, ;
iranto tere kuras.

'48 Plenajn tagojn du batalis ;
sed neniu venkis ; ĝis la tria
kiam ; suno ripozen sinkis.

'49 Plenajn tagojn du batalis ;
sed neniu gajnis ; ĝis la tria
kiam ; suno senluma ŝajnis.
.....

'50 Ĝis la tria tago kiam ; suno
arbojn iras, ; tiam falis heroo
Havgrim, ; tiu vigla viro.

'51 Rajdis giganto for de
bieno, ; monten piedojn metis:
; "Poste ne jarlo el Uplando ;
glore vivos kviete."

'52 Venis homo en la halon ;
inter trabo kaj muro* : ;
"Hastu, alta Harald reĝo, ;
landon por vi sekuri.

'53 Vi rapidu Harald nun, ;
gaja en ora rondo, ; morta
estas nun la ĉefo ; nin
malhelpis longe."

'54 Metis li sub sin tutan
regnon ; ĝis la mara strando, ;
poste iris de tie for ; kaj rajdis
al Uplando.

'55 Jalgrim elvenas frumatene,
; reĝajn knabojn rimarkas, ;
nun parolas al siaj viroj : ;
"Trovu kordojn arkajn."

'56 Jalgrim elrajdas frumatene
; luktulo impete ; kvindek
estis la reĝaj viroj ; falis
unuajete.

'57 Jalgrim siajn virojn vokas :
; "Niajn arkojn streĉu, ; tiel
Harald Harbela* ne ;
uplandanojn breĉu."

'58 Jalgrim rajdas kampon
verdan ; kiel altaj viroj, ; li
faligis haraldulojn ; cent en
unu tiro.

'59 Dek ok estis tiuj fraŭloj, ;
hejmen mesaĝe rolas : ;
"Jalgrim regas en Uplando, ;
lerta ĉefo sola."

'60a Nun kirasos alian trupon ;
en batalan ordon, ; poste
rajdos al Uplando, ; streĉas
selokordon.

'60b Nun kirasos alian trupon ;
por batalo celan, ; poste rajdos
al Uplando, ; streĉas kordon
selan.

'61 Frue estis en mateno, ;
ruĝas antaŭ suno, ; rajdas ili
for arbaren ; antaŭ belan
dunon.

'62 Jalgrim elvenas frumatene,
; reĝajn knabojn rimarkas, ;
nun parolas al siaj viroj : ;
"Streĉu kordojn arkajn."

'63 Jalgrim elrajdas frumatene
; kiel altaj viroj, ; li faligis
haraldulojn ; cent en unu tiro.
.....

'64 Jalgrim rajdas verdan
kampon, ; bona teno pretos
(?), ; kaj faligas haraldajn
virojn ; cent en ĉiu ĵeto.

'65a Jalgrim rajdas verdan
kampon, ; kun sia brila glavo,
; sago flugas lian bruston ;
koron preskaŭ trafas.

'65b Jalgrim rajdas verdan
kampon, ; kun sia glavo glima,
; sago flugas lian bruston ;
koro preskaŭ viktimo.

'66 El si ŝiris li sangan sagon, ;
kiam li rimarkis, ; sendis ĝin
poste en Harald-trupon, ;
multajn vivojn sarkis.

'67 Jalgrim tiam ekparolas: ;
"Mi faligis aŭdace, ; faru nun
kiel en pratempo ; kaj ne donu
gracon."

'68 Hake trivas, poke vivas, ;
ili flekse pendas, ; havas
forton juna Jalgrim, ; li batale
blendas.

'69 Jalgrim rajdas verdan
kampon, ; trupo nun
maldensas: ; "Ĝoja mi rajdas
vespermanĝi, ; fraton trovi
pensas."

'70 Tago prenas vesperon, ;
oni giganton vidas, ; vestis
valon kaj monton ombro, ;
konon jam timidus.

'71 "Staris mi batale hodiaŭ, ;
luktis multan viron, ; nun mi
vidas montogiganton, ; de mi
li alion deziras.

'72 Staris mi batale hodiaŭ, ;
venkon gajnis enorman, ; estas
laca kaj vundegita, ; nun mi
volas dormi."

'73 "Vi neniel dormos dolĉe ;
dum plu mordos glavoj, ; ĝis
mi Inĝibjorgon havos, ; koni
ŝin estas ravo."

'74 Venis li al Jalgrim juna, ;
diras ĉi balado, ; dure per
piedoj frapas, ; maleblas la
sidado.

'75 Rajdis kunen sur verda
kampo, ; famo flugis vaste, ;
ŝvito fluis je lia zono ; kiel
rivero hasta.

'76 Jalgrim donis lertan hakon
; kio fumigis kranion ; "Kaj ne
strange estas ja ; se falos mi
hodiaŭ.

'77 Se mi ne en mia brusto ;
sentus vundon gravan ; ja ne
povus montogiganto ; hejmen
porti havaĵojn."

'78 Jalgrim ĉirkaŭsvingas
glavon ; luktis armile, ŝilde, ;
kaj ekbatis montogiganton, ;
en oston eĝ' malmilde.

'79 Ĵetis giganto feran stangon
; grande tra aero, ; Jalgrim
ricevis mavan frapon, ; cerbo
ŝprucis teron.

'80 Ĝilstajn ek el trupo urĝis, ;
povis kirasojn tranĉi: ; "Al
mastrino Inĝibjorgo ; giganto
ne fianĉos."

'81 Ĝilstajn de la trupo rajdis,
; glavon sian skuis, ; fendis la
teruran giganton ; disen en
pecojn du.

'82 Estis alta Harald reĝo, ;
bonajn donacojn donis, ; al li
Bjarmalandon regi ; kaj
Inĝibjorgon bonan.

'83 Ĝilstajn edzis al Inĝibjorg
; oni al mi atestis ; poste li
portis al Harald reĝo ;
ortrezorojn en kestoj.)

<& Klarigoj (*) al Jalgrima balado:

Klarigoj (*):

'2 Uplando: "Supra lando",
sudnorvega nuntempe
provinco Oppland, malsama ol
sveda Uppland. ;
Bjarmalando: Teritorio je suda
flanko de Blanka Maro, ĉirkaŭ
nuntempa Arĥangelsko.

'3 Heroj: Norvega insulo je
ĉirkaŭ 66-grada latitudo
norda.

'5 Vestajo el lino indikas
terkultivon kaj ioman riĉon?

'12 Grimo, ĉi tie mallongigo
de Havgrimo.

'15 Jarlo: titolo altrangula, plej
elstara homo post reĝo.

'33 Kvejas = kie estas.

'52 Inter trabo kaj muro: ene
en la domo.

'57 Harald Harbela: Unuiginto
de Norvegujo en unu regnon,
vivis inter jaroj 850–933
proksimume. >

& Kanto pri du hungariaj sinjoroj kaj la filino de l' turka imperiestro:

< Rekante 37 el 73 batoj por strofo, entute 2555 paŝoj dum 28 minutoj. El slovaka tradukis Štefan R. Seemann (Slovaka antologio, 1977). Baladigis Martin Strid per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:73> (/miimimi fami mire do; soososo laso sofa mi, miimimi fami mire do; soososo laso fare mi; so laso fare miidodo; soso laasoso fare mido; doTi SoTi TiLa LaLa; so laasoso fare mido; doTi mimi mire mimi;

(# Rekantaĵe: mimi fami mire redo; soso laso sofa fami; mimi fami mire redo; soso laso fare mimi; soso laso fare mido; soso laso faarere mido; doTi SoTi TiLa LaLa; soso laso fare mimi; doTi mimi mire do do)

)×35)+

(& Strofoj:

'1 Pri bel-afero nun al vi ;
volus prezenti kanton mi, ; ion
aŭskulti povu vi, ; kion
scipovas bone mi, ; ĝisnune,
ĉu ne vere vi ; ja ankoraŭ ne
povis aŭdi ; pri l' belega
virgulino ; de l' turka
imperiestro, ; certe vin
priregos miro!

(×: **Amo estas granda forto ;
granda pli ol ĉiu vorto ;
Amo estas nia sorto ; inter
nasko kaj la morto ; Dancu
ĝoje en la ĉeno ; jen survoje,
gaja mieno ; Amo estas nia
sorto ; inter nasko kaj la
morto ; Amo estas granda
forto.)**

'2 Iutage do okazis ; tie, ke du jun-sinjoroj ; kune arestitaj iĝis ; kaj Konstantinopole ; la turka imperia estro ; ekuzante sian povon ; kiel estro imperia ; ordonis ilin sidigi ; en la propran arestejon.

'3 En ioma malproksimo ; de l' imperiestra domo ; estis tiu arestejo, ; en kiu la du sinjoroj ; el hungara lando ; enfermitaj estis, ; jen iliaj nomoj: ; Miĥaelo Siládi ; Venceslao Hadmázi.

'4 Certatempe dum la ; pentekostaj tagoj ; ili kune sidis: ; Miĥael' Siládi ; belega sinjoro ; el la arestej' rigardis ; kaj tre plaĉan kanton ; li per sia citro ; korŝirige ludis.

'5 Spir-ĝemadante ; per voĉo korŝira ; tion ĉi li diris: ; "De ĉi tiu tempo ; post jaro, se Dio volos, ; Miĥael' hejme troviĝos, ; kun la patro kaj patrino, ; kaj sinjorino-fratino ; revenon festenos."

'6 Tiutempe kantomeze ; virgulin' imperiestra ; staris sur lok' ĉefenestra ; en palaco la belega, ; tra fenestreto tre bela ; la ĝem-spiradon ŝi aŭdis ; kaj tuj pro ŝia beleco ; iĝis gaja jen la koro ; de l' tre plaĉa jun-sinjoro.

'7 Kaj poste la virgulino, ; imperiestra filino, ; venis al la arestejo ; kaj ŝi ekgajigis ; la malgajan koron ; de l' sinjor' Siládi, ; parolante al li ; per tre plaĉa voĉo ; la virgulin' diris:

'8 "Post tempo mallonga ; mi senprokraste ; povus al vi helpi ; el arestej' patra, ; el la mizerego ; elkonduki, se min ; promesus edzecon ; vi plaĉa bravulo, ; je via braveco."

'9 Aŭdinte Síladi ; Miĥaelo tion, ; tuj respondis al ŝi: ; "Volu liberigi, ; je honor', religi', ; je braveco mia, ; certe mi faros vin, ; belega virgulin', ; fidel-edzin' mia!"

'10 Virgulin' imperiestra ; kun gardantar' aresteja ; estis ĉion aranĝinta, ; ilin certatempe ; ĉirkaŭ noktomezo ; elarestejigis, ; en la patra ĉeval-stalo ; mem la estra virgulino ; ĉevalojn elektis.

'11 Virgulin' imperiestra ; po unu or-sabro donis ; al la du junaj sinjoroj, ; tiuj senkapigis ; la ĉevalej-mastron ; kaj liajn helpantojn, ; tri bonajn ĉevalojn ; per sel' ekipinte ; rapide forrajdis.

'12 Al la estro turka ; liaj korteganoj ; matene sciigis, ; ke la jun-sinjoroj ; tie ne troviĝis, ; el arestej' fuĝis, ; senkapiginte ; la ĉevalej-mastron ; kaj liajn helpantojn.

'13 Ĉe l' dogana tridekona ; limo oni spektis ; ilin, tuj demandis, ; kien rajd-intencas, ; la du jun-sinjoroj ; hungaraj bravuloj ; al ili respondis: ; "En hungaran landon ; ekprovi feliĉon!"

'14 Tuj senprokraste, ; rapide kaj haste ; la turka estro ; estis alvokinta ; siajn bravajn virojn ; kaj siajn junulojn, ; kaj famajn paŝaojn, ; por sinjorojn kapti, ; ligi, rekonduki.

'15 Ĉe l' tridekon-limo ; turkaj vojevodoj ; fervore aranĝis, ; ke tie, se tia ; kaj tia sinjoroj ; limon pas-intencos, ; ilin bonligite ; Konstantinopolon ; konduki necesos.

'16 Bravuloj hungaraj, ; la sinjoroj junaj ; pasante la limon, ; de la limgardantoj ; estis alkriitaj ; ankaŭ postkuritaj, ; sed la jun-sinjoroj ; prenis siajn lancojn, ; mortpikis gardantojn.

'17 Poste estis ilin ; ankaŭ postkurintaj ; militestroj turkaj ; tuj persekutintaj, ; kiuj ilin alvokadis ; sin-submeton postuladis, ; sed la du sinjoroj, ; la bonaj junuloj ; preteratendadis.

'18 Antaŭ kur-savado, ; interbatalado ; ili virgulinon ; turk-estran filinon ; kaŝe alkondukis ; en arbar-insulon, ; ĉar ja ili timis ; pri ŝia forpreno ; per turka kaptemo.

'19 La junaj sinjoroj ; posedante lancojn ; impete rapidis, ; Miĥael' Siládi, ; Vencesla' Hadmázi ; lerte svingis sabrojn, ; turkajn militestrojn ; kaj la pliajn Turkojn ; sabro-venkis ĉiujn.

'20 Ekde la tagiĝo ; ĝis la tagmeziĝo ; kun Turkoj batalis, ; turkan landon pasis, ; dume propramane ; brave batalante ; la Turkojn venkante ; la junaj sinjoroj ; el hungara lando.

'21 En arbar' tute senhoma, ; virgulino la belega ; treege plendadis, ; ŝi malĝojeg-sente ; kaj tristego-sente ; tion bedaŭradis, ; siajn bel-okulojn, ; belegan vizaĝon ; per larmoj lavadis.

'22 Mallaŭte vortetojn ; por si mem diradis ; virgulino trista : ; "Mi tre min bedaŭras , ; sed eĉ pli bedaŭras ; la junajn sinjorojn , ; ilian la sorton , ; mi virgulin' malfeluiĉa ; en ĉi arbaro senhoma.

'23 Se mi eble mortos , ; do kio okazos ; en ĉi arbaro senhoma , ; kiu min protektos ; aŭ eĉ enterigos ; dum kaj post hor' lasta ? ; Ĉu la birdar' subĉiela , ; aŭ la bestaro kruela ; estos min formanĝegonta !

'24 La bonajn sinjorojn , ; la belajn junulojn , ; hungarajn bravulojn ; mi endanĝerigis , ; kaj kruelan morton ; ili nun suferos , ; tiuj kruelegaj , ; Turkoj koleremaj ; ilin hak-mortigos.

'25 Eterna sinjoro , ; potencega Dio , ; bonvolu aŭskulti ! ; Min mi rekomendas ; kaj mian animon , ; bonvolu ŝirm-preni , ; ankaŭ la iliajn ; animojn grac-plene ; bonvolu protekti !"

'26 Miĥael' Siládi , ; la plaĉa sinjoro , ; ĉion ĉi aŭskultis , ; kaj ŝian plendadon , ; ankaŭ ĝem-spiradon , ; ege li bedaŭris , ; la bel-virgulinon , ; ŝtat-estran filinon ; ĉe-mane ekprenis.

'27 Tuj sen tempo-perdo ; bravulo Siládi ; ĉevalon sursidis , ; la imperiestran ; turkan virgulinon ; sekure surtenis ; Miĥael' Siládi , ; Vencesla' Hadmázi ; rajde forrapidis.

'28 Alveninte ili ; al hungara lando , ; tuj apud la limo ; Vencesla' Hadmázi ; al amik' Siládi ; jene ekparolis : ; "Ni interbatalu ; pri bel-virgulino , ; kiu ŝin ekprenu !"

'29 Tuj respondon donis ; Miĥael' siládi al amik' Hadmázi : ; "Kara frato mia , ; ĉu ŝin mi ne prenu , ; vi ja edziĝinta , ; al mi malenviu , ; ke mi ŝin kunprenu , ; ĉar mi vin mortbatos."

'30 Kaj jen ekparolis ; virgulin' la bela ; al la du bravuloj : ; "Hak-pecigu vi min ; je malgrandaj pecopj ; per sabroj la viaj , ; ĉar interkvereli ; ja ne decas pri mi ; al sinjoroj tiaj."

'31 Tempon ne prodigis ; Miĥael' Siládi , ; sabron elingigis , ; kure proksimiĝis , ; ili renkontiĝis , ; tuj interbatalis , ; Miĥael' Siládi ; manon de Hadmázi ; ĝis kubut' forhakis.

'32 Kaj tiam Hadmázi ; desur
ĉeval' falis ; kaj surgenuiĝis ;
"Mia kara frato, ; Siládi,
bravulo, ; mi petas je Dio, ;
pardonu la kulpon, ; min ja
punis Dio ; pro malnobeleco.

.....

'33 Ĉar mi ja havas ; belan
edzinon ; kaj du junajn filojn, ;
restu do vi sana, ; mia frato
kara, ; iru vi en nom' de Di', ;
estu benita de Li, ; ĉiam fartu
bone, ; tenu min memore!"

'34 La du jun-sinjoroj ; tiel
adiaŭis ; interabsolvinte. ;
Bravulo Siládi ; virgulinon
prenis, ; al si edzinigis, ; la
geedzan staton ; laŭ ordo
kutima ; ĝismorte finvivis.

'35 En la jaro mila ; kaj ankaŭ
kvincenta, ; kaj ankaŭ
sesdeka, ; post la Pentekosto, ;
dum semajn' unua ; kronike
skrib-notis ; unu juna fraŭlo, ;
por propra gajigo ; li ĝin mem
kantadis.)